

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:

Julija Batrakova

Augusto Casquero

Duncan Charters

Renato Corsetti

Mariana Gençeva

Ronald Glossop

Heidi Goes

Julián Hernández Angulo

Małgosia Komarnicka

Zsófia Kóródy

Ilona Koutny

Stefan MacGill

Radojica Petrović

Magdalena Tatara

Kristin Tytgat



ENHAVO

Jozefo NÉMETH: <i>Enkonduko</i>	3
Stefan MACGILL: <i>2010 – ni ĝin eniru per dekoracio</i>	4
<i>La nova estraro de ILEI (biografietoj)</i>	6
Radojica PETROVIĆ: <i>Stipendioj por trejnseminarioj kaj konferenco</i>	11
Kristin TYTGAT: <i>EU-programoj: ebloj por Esperanto</i>	14
Ilona KOUTNY: <i>Jubileaj aranĝoj pri István Szerdahelyi en 2009</i>	19
Renato CORSETTI: <i>Szerdahelyi, Frank kaj Springboard [...] (II.)</i>	21
Radojica PETROVIĆ: <i>Laŭregule aŭ ne: verboj kaj tempoj</i>	26
Rob MOERBEEK: <i>Erarologio 2</i>	28
Heidi GOES: <i>Instrui Esperanton en Indonezio</i>	31
Ronald GLOSSOP: <i>Raporto pri instrua vojaĝo al Ĉinio</i>	33
<i>El la landoj kaj sekcioj (BG, CN, PL)</i>	36
<i>Informoj pri ILEI</i>	41

<i>Titolpaĝe: Ekspozicio kaj polaj dancantoj en Polski Trambesh (vd. p. 36)</i>

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Stefan MACGILL, Pannónia u. 30.I.6, HU-1136 Budapest, Hungario.

Tel. (+36 1) 349-5207, <stefan.macgill@gmail.com>.

Eksteraj rilatoj, kunordigo, konferenco, regularoj.

Vicprez.: Duncan CHARTERS, PO Box 100, Elsah, Illinois 62028-0100, Usono.

Tel. (+1) 618 3745252, fakso: (+1) 618 3745465, <duncan.charters@gmail.com>.

Universitata kaj scienca agado/komisiono, instru-teknologia evoluo.

Sekretario: Małgosia KOMARNICKA, adreso ĝis 15 junio 2010: E-Centro,

Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio.

<margareta.ilei.pollando@gmail.com>. Sekretariaj taskoj.

Estrarano pri financoj: Julija BATRAKOVA, Rusio/Hago, Nederlando. Tel. (+31)

252 515331, <persiko@mail.ru>. Financaj kaj kasistaj aferoj.

Estrarano: Zsófia KÓRÓDY, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412

Herzberg/Harz, Germanio. Tel./fakso (+49) 5521-5983,

<zsofia.korody@esperanto.de>. E-centroj, instrukapabligado, ekzamenoj.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobođenja 36/14, RS-32000 Čačak,

Serbio. Tel. (+381 32) 371053, fakso: (+381 32) 342101, <radojica.petrovic.rs

@gmail.com>. Edukprojektoj, informado, Konf. 2011, terminara komisiono.

Estrarano: Julián HERNÁNDEZ ANGULO, Arbol Seco 371B e/Clavel y Santo

Tomás, Centro Habana, Ciudad Habana, Tel. (+53) 6404484,

<julian@esperanto.co.cu>. Landa agado, komisiono pri lerneja agado.

Estrara komisiito por la Konferenco en Kubo: Ana MONTESINOS DE GOMIS,

Britio, <anamontesinos.esper@btinternet.com>.

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford;
AdE¹

Vicprezidanto: Detlev Blanke,
Germanio, Prezidanto de la Societo
pri Interlingvistiko

Membroj:

Vera Barandovská-Frank,
Germanio, Universität Paderborn;
AIS² San Marino

Duncan Charters, Usono, Principia
College, Elsah

Renato Corsetti, Italio, Università
degli Studi di Roma „La Sapienza”;
AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, LRU,
Indian Statistical Institute, Kolkata;
AdE¹

Michel Duc Goninaz, Francio,
Université de Provence; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių
universitetas

Wim Jansen, Nederlando,
Universiteit van Amsterdam

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Ilona Koutny, Pollando/Hungario,
Uniwersytet im. Adama
Mickiewicza w Poznaniu; AdE¹

Mauro La Torre, Italio, Università
degli Studi Roma Tre

Maria Majerczak, Pollando, Uniwer-
sytet Jagielloński w Krakowie

Geraldo Mattos, Brazilo, Federacia
Universitato de Paranao; AdE¹

Aleksandr Melnikov, Rusio,
Академия Сельскохозяйственного
Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio,
Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

Sekretario: Aida Čižikaitė, Litovio

¹ AdE – Akademio de Esperanto

² AIS – Akademio Internacia de la
Sciencoj, San-Marino

Enkonduko


Pasis precize 6 monatoj de post la elekto de la nova estraro en Krakovo, sed – pro la kumuliĝo de materialoj kaj farendaĵoj – la biografioj povas aperi nur nun. Kiel vi vidas, la proporcio de la virinoj en la estraro estas 43 % (en la hungara parlamento malpli ol 10%), kaj averaĝe ili estas 15 jarojn pli junaj ol niaj viraj estraranoj.

En la nuna numero vi trovos interesajn raportojn pri la E-instrua agado de niaj kolegoj en Azio. Ĝuste antaŭ ol mi ekskribis tiun ĉi enkondukon, mi eksciis pri la estonta UK en Hanojo en 2012. Do, eblas pensi, ke la nombro de partoprenantoj kreskos (espereble) danke al la grandefikaj agadoj de Glossop, Goes kaj Casquero tie.

Nia reprezentanto en la Azia Kongreso (Mongolio, 2010) estos Ana Montesinos – kaj eble aliaj, depende de tio, kiu aliĝas. Ŝi certe partoprenos tiun kunsidon pri edukaj temoj, kiuj devas kunigi sekcianojn el pluraj aziaj sekcioj.

Du materialoj okupiĝas pri gramatikaj temoj, du aliaj pri la ebloj akiri subvenciojn de EU kaj ILEI, kaj du pliaj ligiĝas al István Szerdahelyi. Bonan legadon!

Jozefo Németh, redaktoro
22 januaro 2010



2010 – ni ĝin eniru per dekoracio

Korajn dekoraciitajn novjarajn bondezirojn ni etendas al niaj membroj kaj potencialaj membroj. Komence de la jaro deka (*dekomence?*), indas antaŭenrigardi al la defioj kaj devoj de la jaro. Aldone al la daŭra fortigo de niaj bazaj strukturoj, bonigado de nia retpaĝo kaj intensigo de niaj informfluo, niaj ĉefaj projektoj estas:

- Sukcesigi la kuban konferencon kaj ligitan trejn-seminarion por E-instruistoj*, plie por movadaj organizantoj kaj gvidantoj de interkulturaj projektoj en Latin-Ameriko.
- Kunorganizi kun E@I en SES (Slovakio) seminarion por lernantoj de *lernu.net* pri lingvo-instruado kaj interkultura edukado.
- Partopreni en la Azia Kongreso (junio, Mongolio) kaj subteni la rezultan agadon, precipe ĉe niaj revigliĝintaj sekcioj en Ĉinio kaj Korea Respubliko.*
- Fortigi la instruistan trejnadon en ĉeestaj kursoj (ĉefe ĉe UAM en Poznań kun 4 stipendioj de UEA* kaj ILEI) kaj per lanĉo de voĵ-prepara fazo de trejna retkurso pere de *edukado.net*.
- Pretigi sekvon por la sukcesa pasintjara seminario en Kinŝaso.*
- Kuneldoni kun E@I kaj la teamo de *lernu.net* gramatikan gvidlibron (koncizigitan version de PMEG), por ke tiu rethelpilo por la lernantoj ĉe *lernu.net* atingu pli vastan publikon.
- Aktive serĉi novajn redaktajn fortojn por nia eldonado (simpoziaj kajeroj, lernolibroj, Juna amiko...)
- Okazigi Seminarion pri Subvenci-Petado (SPSP) antaŭvideble en oktobro en Herzberg (la Esperanto-urbo) por vastigi niajn konojn kaj spertojn pri tiuj ebloj.*

Sekve de pretigo de 10-paĝa petodokumento, la estraro de UEA la 10-an de januaro 2010 konsentis disponigi € 2500 por akceli la plenumon de la stele (*) indikitaj projektoj. Aliajn ni financos el nia buĝeto aŭ el niaj fondaĵoj.

La nova jaro portas ankaŭ rutinajn devojn. Niaj sekcioj tra la kristnaskaj tagoj ricevis modelan raportilon pri la agado de 2009, kiun ili plenskribos ĝis la fino de marto. La komitato estos kompletigita kaj ricevos proponon pri reta voĉdonado – pluraj voĉdonaĵoj staras en la vico. Ni atendas raportojn de niaj komisionoj pri 2009. Necesas fermi kaj revizorigi la financojn 2009. ILEI jam engaĝis sin en la laborgrupo ĉe UEA kiu formulas la Strategian Planon 2011-2020.

Nia nunjara konferenco estos unika, intima kaj alispeca ol niaj lastatempaj eŭropaj konferencoj. Tial ni konceptas la programon laŭ la lokaj cirkonstancoj. Tamen, la eŭropa modelo, kun fortiĝanta engaĝiĝo kun universitataj instancoj kaj instruistoj estas evoluiginda. Tiucele la estraro de ILEI jam komence de januaro decidis la lokon de nia konferenco en 2011 – Kopenhago. Sekve, la preparlaboroj jam progresas, kun firmaj planoj okazigi kunlabore kun la Universitato de Kopenhago kaj UEA altnivelan simpozion pri lingvo-komunika temo. Tio okazos en la lastaj konferencaj tagoj, tiel ke ĝi estu samtempe konferenca ero kaj antaŭkongresa evento por la tujsekva Universala Kongreso. Decidite dum mi verkas ĉi tiujn liniojn, ke la Universala Kongreso en 2012 okazos en Hanojo, la ĉefurbo de Vjetnamio. Por doni al ILEI la elekteblon konferenci tiulande, necesas tuj entrepreni landan agadon cele al sondado pri invitemo kaj starigo de landa sekcio, kiu povus provizi per kerno de loka organiza teamo.



Do, lavango da ebloj kaj agterenoj. Pli ol ni scias ekspluati – kaj multo pri kio entuziasmiĝi. Por 2010 ni havas kelkajn defiojn: unue, determini kiel financi ĉi tiun intensigon de la laboro, due, trovi freŝajn laborfortojn, ĉu per pli celtrafa aktivigo de niaj nunaj teamanoj, ĉu per trovo de novaj kunlaborantoj. Kiom ajn belaj la revoj kaj deziroj, finfine devas regi la racio. Plenumiĝos nur tiom, kiom kovras niaj laborfortoj kaj financoj.

Alivorte, tra 2010 regu deko-racio.

Kun tiaj pensoj, ni streĉu niajn emojn, pretaj por partopreni kaj kontribui!
Eko tra deko!

Stefan MACGILL, Roterdamo, 12 januaro 2010

La nova estraro de ILEI



Stefan MacGill (*prezidanto*)

Naskiĝis en Nov-Zelando en 1948. Denaska esp-isto. Kunfondinto de Esperanta Junulara Asocio de Nov-Zelando (1964) kaj aktivulo tie ĝis 1972. Studis en Universitatoj Victoria, Canterbury kaj Massey (69-75), ĉefe geografion. Diplomiĝis instruisto por elementaj lernejoj en 1974. Volontulo (la dua en la programo) en la CO de UEA (1976), oficisto (1977-86). Redaktoro/kunordiganto de Jarlibro (76-86), teknika redaktoro de Kontakto (78-86). Vicprez de TEJO (77-79), prez. (1979-80). Direktoro de CO (1980-84). Redaktoro de Juna amiko (1986-96 kaj ekde 2000). Vicprez. de ILEI (1989-92), prezidanto (1992-94). Restariginto de la ekzamenoj UEA/ILEI kaj ĝia sekretario (1989-95). Gvidis kursojn kaj ekzamensesiojn en multaj landoj. Kunlaboras en la lanĉado de la ekzamenoj de UEA/ILEI laŭ la Eŭropaj normoj kun oficiala agnosko.

Profesie ekde 1989 verkas help-tekstojn por komputilaj programoj (i.a. optika karaktro-rekono). Esploras lingvo-didaktikon kaj preparas E-instrumaterialojn. Vivas en Hungario de post 1986. Havas tri filinojn, Karina (1990), Hajnal (1992) kaj Sonja (2000) – denaskajn esp-istojn.

Eldonaĵoj:

- 1979 La laŭta vekhorloĝo. 32-paĝa legolibro.
- 1981 Tridek roluloj. 84 paĝoj. Kvin teatraĵetoj por lingvo-lernantoj.
- 1985 Pordoj. 88 paĝoj. Simplaj teatraĵetoj por lingvo-lernantoj.
- 1986 Streĉ' eĉ, Steĉj Skeĉ'. 88 paĝoj. Ne-simplaj skeĉoj.
- 1989 La laŭta vekhorloĝo. 200 paĝoj. HEA. Kvar rakontoj kun ekzercoj.
- 1989 Gvidilo por la elementa kaj meza niveloj de la internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI.
- 1991 Najbaroj kaj boroj. 216 paĝoj. Edistudio. Du teatraĵoj kun ekzercoj.
- 1991 Tendaraj tagoj: kajero 1: (1991), kajero 2 (1992), kajero 3 (1993)
- 1996 Mazi en Gondolando: traduk-helpado. Apoga materialo (ne eldonita).
- 1998 Ekzercoj por la vid-bendo 'Pasporto al la Tuta Mondo'.
- 2006 Kontribuinto kaj kunlaborinto en Manlibro de Esperanto, ILEI, 200p.
- 2007 Nemave Edifi, FEL, 264 p. Kvar teatraĵoj, sep eroj.

Duncan Charters (*vicprezidanto*)

Magistriĝis pri la franca kaj hispana lingvoj ĉe la Universitato de Cambridge (Kembriĝo), Anglio, kaj doktoriĝis pri la hispana lingvo kaj literaturo ĉe la Universitato de Indiana en Usono, kie li dediĉis sin ankaŭ al pedagogio de la lingvoinstruado kaj servis kiel kursgvidanto de la unua semestro de la hispana lingvo kaj intensiva somerprogramo. Poste instruis en diversaj programoj ĉe la Lernejo por Internacia Trejnado (*School for International Training of the Experiment in International Living*, nun *World Learning* en Vermont), la Ŝtata Universitato de San-Francisko (SFSU-NASK), kie li instruis ĉiujn nivelojn de E-o inkluzive pedagogion, *Wabash College*, kaj *California State University Humboldt*. Ekde 1974 instruas ĉe *Principia College*, Ilinojso, la hispanajn lingvon, kulturon kaj literaturon, gvidas programon por rajtigo de lingvoinstruistoj instruante pedagogion de la lingvoakirado kaj gvidas lingvocentron kaj kursojn pri aliaj lingvoj inkluzive Esperanton laŭ la intereso kaj bezono de studentaj programoj okazantaj eksterlande. Servis kiel prezidanto de ILEI kaj de la Internacia Ekzamena Komisiono de UEA/ILEI.



Julija BATRAKOVA

Naskiĝis la 29-an de julio 1975 en la verda rusa urbo Ĉeboksaro (ĉefurbo de respubliko Ĉuvaŝia), kiu situas sur la bordo de la rivero Volga.

Post mezlernejo studis ekonomion en la Ĉuvaŝa Agrikultura Akademio. Samtempe partoprenis en la baza trimonata kurso de E-o. Ŝia unua E-aranĝo estis OkSEIT (Okcidenta Semajna Esperantista Internacia Tendaro). Komencis labori ĉe rusa impostservo, fariĝis membro de E-klubo. Saŝa BLINOV inspiris la klubon organizi Lingvan Festivalon.

Kaj ŝi aktive helpis dum la 2-a, 3-a kaj 4-a Festivaloj, ĉefe pri financoj. Ili havis sukceson kaj nun tio fariĝis jam historio, esperantistoj de aliaj urboj kaj landoj transprenis la ideon.

Partoprenis en 1998 en la IJK en Hungario kaj vere ekparolis Esperante. Kaj poste sekvis IJK en Strasburgo kaj aranĝoj en Germanio kaj Hungario.



En la jaro de la jarcentŝanĝo translokiĝis al Nederlando. Lernis la nederlandan lingvon, eklaboris ĉe librotenista firmao, vizitis la Centran Oficejon de UEA en Roterdamo kaj hazarde trovis la vojon al la E-Instituto en Hago. Kelkfoje partoprenis en printempaj renkontiĝoj de nederlandaj esperantistoj kaj en aŭtunaj – de flandra/belga klubo.

Tri jarojn plenumas la taskon de kasisto ĉe NGGE (Nederlanda Grupo de Geinstruistoj de Esperanto). Ilia grupo havas pli-mapli 30 entuziasmajn membrojn. Ili eldonas la gazeton '*NGGE sciigas*' kaj ĉiujare organizas Studotagon. Zorgas pri la administrado kaj jarfinaj dokumentoj, kiel bilanco kaj financa raporto, same kun la estraro – buĝeto por venonta jaro. Samtempe laboras ĉe librotenista firmao kaj plenumas la taskojn enkomputiligi la administracion de klientoj, kalkuli la rezultojn kaj impostojn, fari enspezdeklaraciojn, raportojn por enterprenantoj kaj privataj personoj kaj pri diversaj aliaj financaj demandoj.



Julián HERNÁNDEZ ANGULO

Naskiĝis en Havano (Kubo) la 8-an de aŭgusto 1953. Diplomiĝis kiel instruisto pri la angla en 1978. Laboras kiel instruisto ekde 1973. Ekde la jaro 2000 laboras en la Pedagogia Universitato de Havano. Eklernis E-on en 1979 kaj post unu jaro komencis instrui ĝin en sia asocio. Profitis siajn spertojn kiel lingvoinstruisto por helpi la kolegojn de la asocio diversmaniere. Gvidis plurajn seminariojn por instruistoj en la lando. Verkis ekzercarojn por la lernado de Esperanto en Kubo kaj verkis kun aliaj kubaj instruistoj aliajn lernomaterialojn. Ekde 1981, estas nacia

estrarano de Kuba E-Asocio kaj oficis kiel prezidanto de la asocio de 1990 ĝis 1999. De 2005 ĝis la nuntempo oficas kiel prezidanto de KEA. Instruas E-on en sia lando ekde 1980. Partoprenis en multaj E-kongresoj kaj renkontiĝoj kaj en Kubo kaj eksterlande. En 1994 sukcese trapasis la Mezan Ekzamenon de ILEI dum la ILEI-Konferenco en Kang Nam, Suda Koreio. Poste fariĝis membro de la Internacia Ekzamena Komisiono. Prelegis pri E-instruado en kelkaj ILEI-konferencoj kaj en la du lastaj Tagoj de la Lernejo kaj en Roterdamo kaj en Bjalistoko. Elektiĝis kiel estrarano de ILEI dum la ILEI-Konferenco en Krakovo, Pollando. Estas C-komitatano de UEA.



Malgosia (Malgorzata J.) KOMARNICKA

Polino. Loĝas en Lubin (sudokcidenta parto de Pollando). Altlerneja edukiteco pri morfosciencoj, studentino de postdiplomaj studoj pri interlingvistiko ĉe Adam Mickiewicz-Universitato en Poznań.

Membro de Silezia E-Asocio (ekde 2006). Ekde oktobro 2006 membro de ILEI-PL kaj ekde la 3-a de junio 2007 sekretario de ILEI-PL.

Prezidanto de LKK de 42-a ILEI-konferenco (2009) kaj partoprenanto de Grundtvig-

Asistanteco (2009-2010).

Zorgas pri interreta paĝo de pola ILEI-sekcio, de tempo al tempo skribas artikolojn por E-revuoj.

Parolas, krom Esperanto, la rusan, francan kaj germanan.

Jen kion ŝi skribas pri si mem: "Kiel sekretario mi okupiĝos pri organizaj, oficaj kaj administraj aferoj de ILEI. Mi zorgos pri bonaj interhomaj rilatoj. Mia kutimo estas agi anstataŭ paroli, kaj se mi anticipe scias, ke mi ne sukcesos kvalite labori, prefere mi rezignas antaŭ ol kaŭzi gravajn problemojn."

Zsófia KÓRÓDY

Naskiĝis en Hungario. Parolataj lingvoj: la hungara (gepatre), angla, E-o, germana, rusa (baza). Inter 1975 kaj 1980 studis en la Universitato ELTE (Budapeŝto) en la fakoj angla, hungara kaj E-o. Estas diplomita instruistino pri tiuj 3 lingvoj. 1980-87: dungito de HEA (respondeca pri instruado kaj ekzamenado).

1980-81: partatempa instruistino de E-o en bazgrada lernejo.

1987-2003: instruistino pri la angla kaj E-o en Németh László-Gimnazio.

1989-97: instruistino de la angla en la Budapeŝta Teknika Universitato.

1994-98: partatempa dungito de la Akademio de Belartoj: instruistino de la angla kaj respondeculo pri internaciaj kontaktoj.



1995-2006: mentoro pri instrupraktiko: en sia mezlernejo ŝi gvidis kaj superrigardis la instrupraktikon de la studentoj el 3 budapeŝtaj universitatoj. *E-aktiveco*: gvidis/as lingvokursojn, ankaŭ rekt-metode, organizis tendarojn, konferencojn (ekz. ILEI-Konferenco en 1981), landajn E-renkontiĝojn. Iamaj/nunaj titoloj, funkcioj: vicprezidanto de HEJ (Hungara E-Junularo), komitatano de TEJO, vicprezidanto de TEJO, helpanto-organizanto de TEJO- kaj UEA-kongresoj en Hungario en 1983, estrarano de HEA, gvidanto de Instru- kaj Ekzamenkomisiono de HEA, rajtigita ekzamenanto de IEK, ekstera kunlaboranto respondeca pri E-instruado ĉe la Hungara Edukministerio, ekzamenanto por E-o ĉe la hungara ŝtata lingvo-ekzamenkomisiono (ITK), honorofica kunlaboranto/instruisto por Interkultura Centro en Herzberg, komisiito de GEA por instruado. Ekde 2006 estro de la germana ILEI-sekcio.

Publikaĵoj: artikoloj en E-gazetoj, Gramatika Ekzercaro (eldonis: Hungara E-Asocio, Bp. 1987. – 105 p.), kunlaboranto de Hungara–Esperanta Meza Vortaro (HEA, 1996).

Radojica PETROVIĆ



Naskiĝis en 1949. Magistro pri aktuaria matematiko, asistanto ĉe la Katedro de inform-teknologioj en la Teknika fakultato Čačak de la Universitato de Kragujevac, Serbio.

Esplorintereso: informadiko, asekurado, kvalit-mastruma sistemo, metodiko de prikomputila kaj perkomputila instruado kaj lernado, interkultura pedagogio.

Publikigis infan-gazetan E-kurson, beletrajn tradukojn el kaj al Esperanto, originalajn E-versaĵojn por infanoj kaj recenzojn.

Fake verkis kaj prelegis en la lingvoj serba, angla kaj Esperanto. Instruis E-on en lernejoj kaj eksterlernejoj kaj Esperanto-metodikon en seminarioj por E-instruantoj en Eŭropo, Azio kaj Afriko. Organizis internaciajn renkontiĝojn kaj seminariojn, aplikigis la projekton Interkulturo en Serbio kaj kunordigas ĝin ekde 2003. Estis prezidanto de Serbia kaj Jugoslavia Esperanto-Ligoj (1989 – 1994) kaj A-komitatano de UEA (1995 ĝis 2007). Membro de ILEI ekde 1991 kaj ĝia prezidanto ekde 2003 ĝis 2009.

Stipendioj por trejnseminarioj kaj konferenco

de **Radojica PETROVIĆ** (Serbio)

ILEI realigos dum la jaro 2010 du trejnseminariojn por E-instruistoj kaj instruemuloj celante formadon de kursgvidantoj kaj realigantoj de la projekto Interkulturo, kaj ilian praktikan aktivigon dum kaj post la seminarioj. La trejnado estas planata por esperantistoj kiuj:

- scipovas la lingvon relative altnivele kaj volas plifirmigi la scipovon
- interesiĝas pri instruado de E-o kaj pri la interkultura aliro al lingvo-instruado
- deziras kaj pretas aktiviĝi pri aplikado de E-o al interkultura edukado kaj lernado.

La relative alta scipovo ĉi-kaze signifas, ke la kandidato komprenas sen-probleme prezentadojn kaj legomaterialojn pri pedagogiaj kaj kulturaj temoj, komprenigas sin parole kaj skribe kun evidenta scio de la gramatikaj reguloj kaj vortostoko adekvata por normala konversacio. Laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro por Lingvoj (KER, vd. http://www.coe.int/T/DG4/Portfolio/documents/globalscale_esperanto.pdf) tio signifas lingvoposedon je la niveloj B1/B2/C1. Laŭ la tradiciaj ekzamenoj de ILEI/UEA, tio ekvivalentas al la nivelo de elementa aŭ meza ekzamenoj.

La unua seminario okazos enkadre de SES en Slovakio, 2-10/07/2010 (http://eo.lernu.net/pri_lernu/renkontighoj/SES/instruado.php) kaj estas organizata kunlabore kun E@I. La aliĝilon vi trovos ĉe http://eo.lernu.net/pri_lernu/renkontighoj/SES/aligxilo.php. La dua estos dum la konferenco de ILEI, 11-17/07/2010 en Matanzas, Kubo. Ĉe <http://www.esperanto-mexico.org/eo/taxonomy/term/9> vi trovos la bazajn informojn pri ĝi kaj ligilojn al la aliĝilo kaj la Unua Informilo kun pliaj detaloj. Por 10 partoprenantoj en la unua seminario kaj minimume 5 unuavice latinamerikanoj en la dua, kiuj plenumos la ĉi-supre prezentitajn kondiĉojn, ILEI donos stipendion por kovri la kotizojn, restadkostojn kaj, eventuale, parton de vojaĝkosto. La Amerika Komisiono de UEA donos el aliaj fontoj pliajn stipendiojn por la seminario en Kubo. La kriterioj por elekto estas:

- certeco pri kontribuo de la kandidato al la celoj de la seminario kaj postseminaria laboro
- ĝisnuna kontribuo al disvastigado de E-o; la nivelo de scipovo de E-o
- sumo de la kostoj kiujn la kandidato povas mem pagi
- rekomendo de ILEI-sekcio aŭ alia E-institucio.

Demandaro por petantoj de stipendio

-
1. Familia(j) nomo(j) : _____ 3. Vi estas: _____
2. Persona(j) nomoj(j): _____ viro O / virino O
4. Naskiĝdato _____ 5. Lando _____
6. Plena adreso _____
7. Retadreso _____
8. Telefono (hejma) _____ 9. Poŝtelefono _____
9. Profesio / okupo _____
10. Aliaj konoj kaj lertoj? _____
11. Ĉu vi iam partoprenis internaciajn E-aranĝojn? Kiu(j)n, kie, kiam? _____
-
12. Por kiu seminario vi petas la stipendion: en Slovakio O / en Kubo O
13. Se en Kubo, ĉu vi povas resti pli longe por UK kaj IJK? _____
14. Kiel vi lernis Esperanton? _____
15. Kiam vi komencis? _____
16. Ĉu vi estas membro de iu landa aŭ internacia Esperanto-asocio? Kiu(j)? _____
-
17. Pritaksu vian E-lingvonvelon: baza O // meza O // alta O // tre alta O
18. Ĉu via E-organizo, aŭ alia aktiva esperantisto, rekomendas vin por la stipendio? Se jes, bonvolu aldoni la rekomendon. _____
19. Ĉu vi pretus helpi la organizantojn por diversaj aranĝoj dum aŭ post la seminaria semajno? Kiel? _____
20. Ĉu vi iel kontribuis al la disvastigo de Esperanto? Kiel? _____
21. Kiel vi intencas estonte kontribui al la disvastigo de Esperanto utiligante la sciojn kaj lertojn akiritajn dum la seminario? Priskribu laŭnecese detale. _____
22. Se vi aliĝos al la E-aranĝoj en Kubo, julio 2010, ĉu vi pretus antaŭ kaj/aŭ post la kongreso labori kelkajn horojn por la Amerika Komsiono de UEA? _____
23. Kiom alte vi taksas viajn vojaĝkostojn ĝis: Slovakio _____ / Kubo _____
24. Ĉu vi povas mem pagi la vojaĝkostojn, aŭ kiun parton vi povas mem pagi? _____
25. Ĉu vi volas partopreni en antaŭseminaria lernado kaj komunikado kun aliaj partoprenontoj prepare por la seminario? _____

Interesatoj bonvolu retajpi/reskribi la demandaron, aŭ transpreni ĝin el la retejo ilei.info, respondi kaj sendi ĉu papere ĉu rete al la estrarano pri edukprojektoj. Por viaj respondoj uzu tiom da spaco kiom vi bezonas.

Limdato: la 15-a de marto 2010. Ni invitas la landajn sekciojn kaj partnerojn de ILEI kuraĝigi kaj proponi siajn kandidatojn konforme al la prezentitaj kondiĉoj kaj kriterioj.

Ni anticipe dankas tiujn kiuj materie subtenos la seminariojn per enpagoj al

- 1) ILEI (konto ilek-a ĉe UEA, kun indiko “Seminario Kubo 2010”, aŭ Seminario SES 2010) (Informoj pri pagoj al UEA:
http://www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html)
- 2) Amerika Fondaĵo de UEA, (Informoj pri pagoj al UEA:
http://www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html)
- 3) Fondaĵo Mondo (en Germanio), kontonumero: 151100004, gvidn-ro: 60090100, Stuttgarter Volksbank. El eksterlando: IBAN: DE21600901000151100004 // BIC: VOBADDESS, Stuttgarter Volksbank.
- 4.) Fondaĵo “Esperanto al Ameriko”, Konto: stif-r ĉe Flandra Esperanto-Ligo IBAN: BE66 0000 2653 3843, BIC: BPOTBEB1, Postbank, Koloniënstraat 56, BE-1000 Brussel.

Ni precipe dankas tiujn, kiuj jam enpagis sian subtenon por nepagipovaj aliĝontoj de la ILEI-konferenco en Kubo 2010.

Radojica PETROVIĆ, estrarano pri edukprojektoj (adreso sur p.2)

Konferenca ĝisdatigo

UEA anoncis siajn flugproponojn; vizitu ilian hejmpaĝon por informoj. Durektaj flugprezoj el Eŭropo ekde €560 estas akireblaj. Tiuj biletoj validas dum 21 tagoj post la ekfluga dato, la restado devas inkluzivi la tagojn de la UK kaj oni devas esti UK-ano. Oni mendas rekte tra Cubana. Ankaŭ ofertoj el Ameriko ekzistas. Esperantotur el Pollando ofertas pakaĵojn kiuj inkluzivas nian konferencon.

Aliĝoj alvenas por la konferenco, kune kun donacoj al Fondaĵo Dazzini, kiu permesos al ni inviti kubajn kaj apudlandajn instruisto-kolegojn al nia konferenco kaj ĝia trejna seminario. Ni kore dankas al: Duncan Charters €100; Ana Montesinos de Gomis €75; Synnöve Mynttinen €1 200; Claude Nourmont €84; Marija Jerković €5; UEA €500. Sume por Kubo: €1 964.

EU-programoj: ebloj por Esperanto

de **Kristin TYTGAT** (Instituto Erasmus Bruselo/Brusela Libera Univ.),
<kristin.tytgat@ehb.be>



Eŭropa Unio ofertas abundon da programoj por interuniversitata kunlaboro kaj ili ne nur celas la membroŝtatojn.

Estas do bona ideo esplori kiuj programoj povus utili al la E-movado. En tiu rilato E-o povas esti ligilo inter universitataj profesoroj, kaj ne devas esti nepre celo. Estas ja multe da universitatoj kie instruas esperantistoj kiuj ne nepre instruas

E-on. Ili spertas pri sia fako, sed konas E-on aŭ eĉ aktivas en la E-movado. E-o povus do esti aldona valoro, plia eblo en la interuniversitata kunlaboro.

Ĉar EU estas demokratia, burokrata organizo, oni devas tre strikte sekvi la regulojn de tiuj programoj por ricevi subvencion. Tio estas klara kondiĉo por havi ŝancon partopreni en ili. Kelkfoje esperantistoj emas adapti gvidliniojn al siaj bezonoj aŭ prioritatoj. Tio ne eblas en tiu ĉi kunteksto. EU permesas kaj stimulas kunlaboron pri kio ajn inter universitatoj, tiel longe kiel la studobjekto antaŭenigas la eŭropan dimension kaj la agantoj obeas la regulojn de la projektoj.

En tiuj kondiĉoj devas esti ŝanco por esperantistaj profesoroj eniri iun eŭropan kunlaboron. Problemo de la lastaj jaroj estas, ke la EU-projektoj fariĝas multe tro grandaj. Certe al la E-movado mankas la homfortoj realigi aŭ eĉ partopreni en tiaj ampleksaj projektoj.

Kio estas realigebla por ni?

Unue ni devas decidi kion ni volas atingi per tiuj programoj:

- Ni povas interŝanĝi studentojn aŭ/kaj profesorojn.
- Ni povas krei aŭ partopreni en eŭropaj retoj inter universitatoj. EU tre ŝatas, ke fakuloj havu kontaktojn, interŝanĝu siajn sciojn kaj regule renkontiĝu. Tion ĉion ankaŭ esperantistoj ŝatas.
- Ni povas entrepreni komunajn esplorprojektojn, ekzemple pri temoj ŝatataj de la E-movado: multlingveco, interkultura komunikado, ... Mia universitato jam membras en reto pri multlingveco subvenciata de EU.

- Ni povas organizi renkontiĝon de profesoroj kvankam EU ne subvencias sciencajn kongresojn.
- Aliaj ebloj kiel la organizo de intensivaj programoj aŭ staĝoj por studentoj estas verŝajne ne tro realismaj por la E-movado.

Ni unue parolu pri la Erasmus-programo de EU, kiu plej verŝajne ofertas konkretajn eblojn por la E-movado sen tro da peza prepara laboro.

1. **LLP** (*Lifelong Learning Programme* = "programo por lernado dum la tuta vivo". Vidu: <http://ec.europa.eu.llp>)

1) Erasmus

EU jam dum 20 jaroj organizas la programon Erasmus, kiu ĉefe celas interŝanĝojn kaj nun estas parto de la grandega LLP-programo. Oni ofte diras, ke la plej sukcesaj atingaĵoj de EU estas la eŭro kaj ... Erasmus. 31 landoj (do pli ol la 27 EU-membroŝtatoj) kaj 3100 universitatoj partoprenas en LLP. Tio estas 90% de la universitatoj en Eŭropo. Dum 20 jaroj (1988-2008) jam proksimume 1,7 milionoj da studentoj studis en alia lando kadre de Erasmus. EU donas stipendion por tiu studperiodo en eksterlando. La studorezultoj de la studento eksterlande devas esti agnoskitaj en la hejma universitato pere de kreditpoentoj. Ĉio okazas en la kadro de la Bologna-procezo kiu volas harmoniigi kaj unuformigi universitatajn programojn en Eŭropo.

La nomo Erasmus rememorigas pri la klerulo Erasmus de Roterdamo (1465-1536), kiu studis vojaĝante tra Eŭropo kaj laboris en la tiamaj grandaj universitatoj de Eŭropo kiel Parizo, Loveno kaj Cambridge. Komence EU elektis por siaj programoj belajn nomojn de eŭropaj kleruloj (Socrates, Leonardo kaj aliaj). Lastatempe pli kaj pli bedaŭrinde ĝi elektas anglalingvajn akronimojn, kiuj estas unuavide sensignifaj kaj kiuj krome estas tre malfacile memoreblaj: ACP, TEP, ICI ECP, LLP... Komence fakte ankaŭ la nomo Erasmus estis mallongigo, sed ne tro indas nun mencii la plenan komencan nomon.

La LLP-programo validas nun de 2007 ĝis 2013 kaj disponas pri 7 miliardoj da eŭroj. La universitatoj kiuj partoprenas devas esti agnoskitaj de EU.

En LLP ekzistas centralizitaj kaj malcentralizitaj agadoj. Malcentralizitaj estas grandparte organizitaj de la membroŝtatoj mem: Erasmus estas ekzemplo de tio, kio signifas, ke ekzemple la alteco de la stipendioj

povas tre malsami de unu lando al la alia. La centralizitaj agadoj estas en la mano de la Eŭropa Komisiono de EU, pli precize de EACEA, Plenum-agentejo por Edukado, Aŭdvida Sektoro kaj Kulturo.

Oni povas nomi la Erasmus-programon la motoro de la modernigo kaj alproksimiĝo de la diversaj eduksistemoj en Eŭropo. Leonardo da Vinci, kiu ebligas praktikajn staĝojn por studentoj, nun ankaŭ estas parto de LLP.

Cetere, en tiu ĉi artikolo mi nur pritraktas la LLP-programerojn, kiuj celas la kunlaboron inter universitatoj. Ekzistas ja ankaŭ Comenius, Grundtvig kaj aliaj programeroj por kunlaboro je alia nivelo.

Studi kaj labori eksterlande donas al EU-civitano pli larĝan konon de la kulturoj de Eŭropo, altigas la interkulturajn kapablojn kaj ankaŭ la konon de si mem. Pro tio la interŝanĝoj estas grava ero en la edukpolitiko de EU. Tiuj celoj estas tre valoraj ankaŭ por esperantistoj. Tial ni esploru kiel ni povas partopreni en LLP/Erasmus. La avantaĝo de Erasmus estas, ke ne temas pri vera projekto kun multe da farenda laboro en malmulte da tempo, sed pri duflanka kunlaboro inter universitatoj. En la duflanka kontrakto la du partneroj mem decidu, kion ili entreprenos komune.

Mi menciuj ĉi-rilate konkretan ekzemplon: mia instituto en Bruselo jam kunlaboris dum jaroj kun la Universitato A. Mickiewicz en Poznano. Ni organizis interŝanĝojn por studentoj kaj profesoroj rilate al la pola kaj la nederlanda lingvoj. Estis sufiĉe facile por d-ro Ilona KOUTNY el Poznano kaj mi konvinki ambaŭ universitatojn plilarĝigi la kontrakton tiel, ke ankaŭ la interlingvistikaj studoj de Poznano fariĝu parto de la Erasmus-programo kaj la interŝanĝoj povu ricevi EU-subvenciojn.

Interŝanĝotaj studentoj povas ricevi stipendion nur de la propra universitato. La minimuma periodo por studi eksterlande estas tri monatoj, la maksimuma 12. Ili devas kandidatiĝi laŭ la proceduroj de la hejmuniversitato, prezenti por la eksterlanda studperiodo studprogramon kiu enhavas sufiĉe da kreditoj kaj kiu estu aprobita de la hejma kaj de la gastuniversitato. La ekzamenrezultoj poste devas esti agnoskitaj de la hejmuniversitato.

Studentoj ne pagas registriĝmonon eksterlande kaj povas tie studi ekde la dua studojaro. La alteco de la stipendio dependas de la hejmlando.

Profesoroj povas viziti la eksteran partneron dum periodo de kelkaj tagoj ĝis ses semajnoj por priparoli la interŝanĝojn de studentoj aŭ por mem instrui (minimуме 5 instruhoroj). Ankaŭ profesoroj ricevas stipendion de la propra universitato, sed ankaŭ ĉi tie la altecon de la subvencioj decidas la

hejmlando. Ankaŭ administra personalo povas vojaĝi kaj trejniĝi eksterlande. Por la malmulte uzataj kaj instruitaj lingvoj EU donas apartajn subvenciojn por lingvokursoj en la koncerna lando antaŭ la komenco de la semestro (EILC-lingvopreparado). La kursoj daŭras de 3 ĝis 6 semajnojn, enhavas 60 instruhorojn kaj donas studokreditojn.

Universitatoj povas organizi intensivajn programojn (IP) kun siaj kaj kun eksterlandaj studentoj. La aranĝo daŭras kelkajn tagojn. Pli realigebla por la E-movado estas eble la ellaboro de komunaj studprogramoj (CD): oni povas plibonigi ekzistantajn aŭ krei novajn programojn helpe de la alia(j) partnero(j).

“Universitatoj povas evoluigi studprogramojn, kiuj aktive subtenas multlingvecon, lingvistikan diversecon, interkulturajn interŝanĝojn en la eŭropa socio.” (El la LLP-gvidlinioj: propra traduko). Por esplori eblan estontan kunlaboron, EU antaŭvidas preparajn vizitojn por profesoroj.

2) En la **transversa agado (agado numero 2)** lingvoj ludas gravan rolon. Ĉi tie eblas peti **multflankajn projektojn** kun atento je:

- malofte uzataj lingvoj
- mondaj lingvoj: rusa, japana, ĉina, araba,...
- interkultura kompreniĝo
- evoluigo de metodologioj por instrui lingvojn
- stimulo de multlingva interkompreniĝo
- stimulo de lingva diverseco.

Oni povas ankaŭ sub tiu ĉi agado **krei retojn**, por ke eŭropaj universitatoj estu en kontakto. En tiu ĉi kunteksto oni povas krei ekzemple katedron pri multlingveco kaj interkultureco aŭ esplori la lingvolernadon de junaj infanoj.

3) La programero **Jean Monnet** en LLP koncentriĝas al la eŭropa integriĝo kaj povas okupiĝi pri instruado, esplorado kaj reflektado pri tiu ĉi temo. Ebla laborkampo povas esti: *EU kaj la dialogo inter popoloj kaj kulturoj*.

2. ERASMUS MUNDUS

Ĉi tie temas pri kunlaboro de EU-landoj kun universitatoj en la tuta mondo, kun la celo altigi la kvaliton ĝenerale kaj stimuli la interkulturan kompreniĝon. Aparte interesa ĉi tie estas la agado numero 2, kiu temas pri

partnerecoj por la interŝanĝoj de profesoroj kaj studentoj. Mia konsilo al esperantistoj ĉi tie estus provi aliĝi al la jam ekzistantaj projektoj de via universitato, ĉar la konkurenco en EU por akiri financadon inter la diversaj projektoj estas tre granda.

3. TEMPUS (CARDS-TACIS-MEDA)

Tempus subtenas la modernigon de universitatoj en la okcidentaj Balkanoj, en lando de eksa Sovetunio escepte de la baltaj ŝtatoj kaj en landoj apud Mediteraneo escepte de la EU-landoj. Ĉar temas pri grandegaj projektoj, ili eble ne estas celitaj al esperantistoj.

4. Edulink, ACP Scienca kaj Teknologia Programo

Tiu ĉi programo estas por Afriko, Karibaj kaj Pacifikaj landoj. Ĝi estas esplorinda.

5. TEP

Transatlantikaj Interŝanĝaj Partnerecoj kun Kanado kaj Usono (Atlantis). Por tiuj ĉi projektoj ekzistas malgranda ŝanco je sukceso, ĉar ili devas enhavi elementon de renovigo, kiun estas tre malfacile trovi.

6. ALFA III/ALBAN

Tiu ĉi programo estas por landoj de Latinameriko kaj iniciatoj devus esti kontrolitaj de esperantistoj rilate al la realaj ebloj.

7. ASEM-DUO

Ĝi estas interŝanĝoprogramo por profesoroj kaj studentoj inter Eŭropo kaj Azio.

8. ICI EP

Temas pri programo inter EU kaj Aŭstralio, Nov-Zelando, Japanio kaj Sud-Koreio.

KONKLUDO

Por ĉiuj programoj ekzistas gvidlinioj en la reto, kiujn oni devus atente pristudi antaŭ ol komenci iun ajn preparlaboron por projekto.

EU estonte specife esploros la kunlaboreblojn kun jenaj landoj: Ĉinio, Barato, Israelo, Brazilo kaj Meksiko. Temas pri landoj, kiuj estas gravaj ankaŭ en la E-movado. Ni sekvu do la direkton en la eksteraj rilatoj de EU.

Jubileaj aranĝoj pri István Szerdahelyi en 2009

de **Ilona KOUTNY** (Pollando/Hungario)

Al. la du gravaj jubileoj de 2009 – la 150-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof kaj la 100-jara datreveno de Lapenna – aliĝis la rememoroj pri István Szerdahelyi (1924-87). Lian ekzemplodonan figuron kaj sindediĉan agadon por la lerneja, speciale superalerneja instruado de Esperanto prezentis artikolo en IPR 09/3.

ILEI festis sian iaman prezidanton dum sia konferenco en Krakovo per la prelego de Ilona KOUTNY. Dum la bjalistoka UK mallonga simpozio (sub la aŭspicio de AdE kaj CED) estis dediĉita al István Szerdahelyi. Prezentis lin kaj lanĉis la libron *Abunda fonto* omaĝe al li Ilona KOUTNY, redaktinto, lia iama studentino kaj posteulo en ELTE dum jardeko.



Memorfesto en Budapeŝto (30 aŭg. 2009) kun familianoj de Szerdahelyi

Liajn – daŭre aktualajn – temojn traktis liaj iamaj gestudentoj kaj kolegoj, kiujn li iel influis: Probal DASGUPTA analizis la morfeman sistemon de E-o; Renato CORSETTI la propedeŭtikan valoron de Esperanto de Szerdahelyi ĝis Springboard (IPR 09/4-10/1). Zsófia KÓRÓDY prezentis la provojn de Szerdahelyi enkonduki E-on en la instrusistemon de fremdaj lingvoj; István ERTL specifajn aspektojn de tradukado el kaj al E-o. La specifajojn de la

Esperanta leksikografio kaj uzon de komputiloj en leksikografio skizis Ilona KOUTNY, kiu gvidis la programon.

Tuttaga memorfesto dediĉita al prof. Szerdahelyi sekvis en Budapeŝto la 30an de aŭgusto [vd la foton sur p.19.] kun partopreno de lia familio (edzino, du filoj, 5 nepoj). Enkondukis la memortagon Imre SZABÓ, prezidanto de HEA, rememoris pri la meritoj de Szerdahelyi la nova ILEI-prezidanto, Stefan MACGILL, kaj transdonis salutojn Zlatko TIŠLJAR, kiu poste prezentis filmitan intervjuon kun la festato.

Post la prezento de la vivo kaj verko de prof. Szerdahelyi fare de Ilona KOUTNY kaj transdono de la memorlibro, alparolis la filo, Balazs SZERDAHELYI. Prelegis iamaj hungaraj kolegoj kaj studentoj: Blazio VAHA pri gramatikaj temoj de Szerdahelyi, Árpád RÁTKAI skizis la vojon de Zamenhof ĝis Szerdahelyi, György NANOVSZKY traktis lingvopolitikon, Márta KOVÁCS la novajn lingvoekzamenojn, Zsófia KÓRÓDY kaj István ERTL. Kvankam lia granda atingo, la E-fako de ELTE finis sian agadon en 2009, liaj disĉiploj plu agas.



Post Szerdahelyi-prelego en Sarlanda kultura semajnfino (Homburg)

La 25a Arkones, kultura aranĝo de Poznano (18-20.09-09) gastigis same prelegon pri la elstara hungara pedagogo. Prelegaro pri Szerdahelyi estis en la fokuso de la Sarlanda kultura semajnfino (Homburg, 20-22.11.2009), kiu ebligis al Ilona KOUTNY prezenti pli detale la agadon de la grava interlingvisto, esperantologo, revokante ankaŭ liajn fotojn kaj voĉon.

La germanlingva GIL-konferenco (28-30.11) en Berlino traktis la influon de gravaj personecoj al interlingvistiko, kie ne povis manki prezento de la kontribuo de István Szerdahelyi (fare de I. KOUTNY).

Liaj artikoloj kaj libroj (kvankam malfacile alireblaj) meritas pli grandan atenton, ĉar liaj ideoj ankaŭ nun estas validaj.

Szerdahelyi, Frank kaj *Springboard*: kion komunan ili havas?

(mallongigita versio, II-a parto¹)

de **Renato CORSETTI** (Italio)

3. La rolo de Helmar FRANK

Helmar G. FRANK naskiĝis la 19-an de februaro 1933 en Waiblingen. Li estis profesoro pri kibernetiko kaj prezidanto de AIS Sanmarino.

FRANK estis jam konata kiel sciencisto pri kibernetika instruado en neesperantistaj rondoj tra Eŭropo, kiam li ekaktivis pri E-o.

Li, tamen, vivis en lando kaj en tempo en kiu la ĉefa problemo estis la lernado de la angla. Pro tio FRANK estis devigata evoluigi teorion, kiu pravigus la uzon de E-o por posta lernado de la angla. Lia modelo estis prezentita en tre rafinite matematika maniero, kiu kovris la bazan ideon pri ŝparo de tempo per dediĉado de la unua periodo al lernado de E-o kaj nur poste de la angla.

FRANK profitis sian universitatan pozicion en la universitato de Paderborn por lanĉi en la 70-aj jaroj ambician programon, kies nomo estis "Lingva Orientado". La praktika eksperimento, kiu okazis en tiu kadro, estis instruado de E-o antaŭ ol instruado de la angla al klasoj en la unuagradaj lernejoj (tria kaj kvara jaroj) en la lernejoj de la germana

¹ La 1-a parto aperis en IPR 2009/4 p.4-8. La bibliografio kaj la originala prelego (ILEI-Konf., Krakovo, 23 jul. 2009) troveblas: www.ilei.info/pdf/Corsetti_SzI.pdf

landoparto Niedersachsen [Niderzahsen]. Entute partoprenis 556 lernantoj, kiuj lernis E-on (parto dum unu jaro kaj parto dum du jaroj) antaŭ ol lerni la anglan.

Oni mezuris la konon de la angla fine de la 5-a kaj 6-a jaroj kaj oni komparis la rezultojn kun tiuj de la kontrol-klasoj, kiuj ne estis lernintaj E-on. Laŭ FRANK la rezultoj montras pli grandan konon de la angla je 20% aŭ 30% depende de la longeco de la tempo, en kiu la infanoj lernis E-on antaŭ ol lerni la anglan. La rezultoj estas efektive atentindaj en si mem. Al tiuj oni aldonu, ke la lernintoj de E-o havas pli grandajn prilingvajn kapablojn ankaŭ pri la germana mem. Ni parolos poste pri tiu efiko de la lernado de E-o. Sed, iom surprize, la eksperimentaj klasoj ŝajnas havi pli bonajn rezultojn ankaŭ pri geografio kaj matematiko .

FRANK kaŭzis sensacion en la E-mondo per ĉi tiuj tre favoraj rezultoj. Ne estas nia tasko nun paroli pri la mezuraj metodoj, kiuj eble parte respondecis pri la alteco de la favoraj rezultoj, sed certe la granda interesiĝo pri la lernofaciliga valoro de E-o en la lastaj jardekoj estas rekta merito de FRANK mem. Ni aldonu la fakton, ke FRANK havis grandan personecon kaj ke li estis tre aktiva ankaŭ, ĉar li estis la kreanto de tuta movado ĉirkaŭ universitata instruado kaj E-o. Ni jam diris, ke li estis prezidanto de la Akademio Internacia de la Sciencoj: AIS-Sanmarino, kiu kunordigis la utiligon de E-o por instruado universitatnivela.

Tio, kio ne sukcesis, estis la transirigo de ĉi tiuj studoj al la neesperantistoj. Mi mem ne sukcesis trovi eĉ unu mencion pri la agado de FRANK aŭ de la ceteraj e-istoj en la faka literaturo neesperantista.

Konklude la rolo de FRANK por popularigi inter e-istoj la koncepton, ke oni utiligu la lernofaciligan valoron de E-o por proponi instrui ĝin en lernejoj, estis giganta. Kvankam ILEI subtenis tion, ne estas duboj, laŭ mi, ke la plej granda merito estas tiu de FRANK. Ne temas pri malgranda merito, se oni pensas, ke en tiu periodo la eŭropaj e-istoj renkontis ĉiam pli da malfacilaĵoj proponi la instruadon de E-o al homoj, kiuj ĉefe volis lerni la anglan.

Mi mem restas tre skeptika pri la ĝenerala valoro de la rezultoj de la eksperimento de FRANK. Tion mi jam diris en aliaj artikoloj kaj nun reasertas ĝin, sed tio nenion forprenas de la meritoj de li, kiel patro aŭ almenaŭ akuŝisto de ĉi tiuj konceptoj en la dua duono de la pasinta jarcento.

4. Preter FRANK

Kiel mi jam diris, la neesperantista mondo tute ne ekkonis la rezultojn de FRANK aŭ simple ignoris ilin. Grandega parto de la ignoro ŝuldiĝas al la manko de prestiĝo de E-o, pro kio, ĉio kunligita kun ĝi, eĉ se plej science ellaborita, emas ne esti eĉ legata. "Ni volas lerni la anglan, ne ludi kun eksperimentoj de la pasinteco" asertas la plej realismaj fakuloj, kiuj ne komprenas esti kaptitaj de sia tempo kaj de la ideoj de sia tempo.

Pro tio, dum daŭris la eksperimentoj laŭ la indikoj de FRANK oni ankaŭ komencis evoluigi aliajn esplordirektojn. Unu el ili estas la prilingvaj kapabloj, tio estas la efiko de la lernado de E-o al la kapablo rezoni pri lingvoj, inkluzive de la propra nacia lingvo. Vi memoras, ke ankaŭ la infanoj esploritaj de FRANK en Germanujo montris pli bonajn rezultojn en la germana.

Unu eksperimento, pri kiu ni parolas ĉi tie, estas detale analizata en artikolo en la revuo *Language Problems & Language Planning*. Temas pri eksperimento bazita sur individuoj, kiuj apenaŭ povus esti nomataj dulingvuloj, ĉar ilia grado de kono de la dua lingvo estis plene komencanta.

La infanoj estis 12-jaraj lernantoj de itala publika lernejo en unu el la malbonaj periferiaj kvartaloj de Romo (Aprilia). La eksperimenta grupo estis instruata pri E-o du horojn semajne dum la normala lernojaro de oktobro ĝis la fino de majo. La kontrol-grupo apartenis al la sama lernejo, kaj temis pri infanoj samaĝaj, kun la sama socia-kultura nivelo de la familioj (malalta por ambaŭ grupoj) kaj kun la sama intelekta nivelo (mezurita per la matricoj de Raven).

Ili (kaj la eksperimenta grupo kaj la kontrol-grupo) estis esplorataj pri la prilingva kapablo per testo utiligata en pluraj landoj, la tiel nomata TAM (*Test di Abilità Metalinguistiche* = *testoj de kapablo translingva*).

Ili estis esplorataj per la itala versio de tiu testo rilate al la prilingvaj kapabloj en la itala, kaj ne en la lernata dua lingvo.

Jen tre esence la rezultoj:

Tabelo 1-a

*Meznombra poentaro akirita de la du grupoj
pri la respondoj rilatantaj al prilingva konscio*

	<i>Kontrol-grupo</i>	<i>Eksperimenta grupo</i>
• 1-a testo	24,85	24,98
• 2-a testo	27,08	27,96
• 3-a testo	30,76	47,02

La komparo de la du kolumnoj klare montras, ke el situacio de sameco la grupo, kiu lernis duan lingvon, akiris fine de la lerno-jaro konsiderindan superecon.

Tio cetere ne devas multe mirigi. La supereco de dulingvuloj rilate al unulingvuloj ŝuldiĝas, kiel ni diris antaŭe, al la fakto, ke ili devas daŭre kompari la malsamajn strukturojn de du lingvoj. Kaj tio estas la samo, kion lernantoj estas devigataj fari en la lernejo, kiam ili lernas fremdan lingvon.

5. Nuntempe: *Springboard*

Ĝuste pri la prilingva konscio koncentriĝas la esploroj de la universitato de Manchester pri la lernado de E-o en la projekto *Springboard to languages*. Bedaŭrinde tiuj esploroj estas ankoraŭ en la komenco, kaj la unuaj rezultoj ne ŝajnas indiki multon rilate al la lernfaciliga valoro de E-o. Eble temas pri tro malgrandaj infanoj, eble temas pri tro mallonga instru-tempo por E-o, sed oni trovas ankoraŭ tre malmultan efikon. Ĉi tie ni kopias la rezultojn (en traduko al E-o) el la dokumento de la Universitato de Manchester, kiu aperas en <http://www.springboard2languages.org/Summary%20of%20evaluation,%20S2L%20Phase%201.pdf>:

"Ĉu Springboard helpas lerni aliajn lingvojn?

La lernantoj estis invitataj kompreni la francan frazon: '*Les oreilles de l'éléphant sont très grandes et le nez est très long*' [La oreloj de la elefanto estas tre grandaj kaj la nazo estas tre longa]. La solaj infanoj, kiuj sukcesis traduki la tutan frazon venis el la lernejo A. Interese! Ĉi tiuj du infanoj utiligis interesajn prilingvajn kompren-strategiojn (similaj vortoj, punktaro, kunteksto). La infanoj el la lernejo B, kiuj ankaŭ lernas la francan, sukcesis nur margene pli bone ol la infanoj de la lernejo A.

- 71% el la infanoj kapablis rekonii plurnombrajn vortojn en aliaj lingvoj en almenaŭ 4 el 6 okazoj, sed estis granda proporcio de ne-respondintoj (n/r).

- 53% kapablis kompreni la du frazojn (el 4, en la hispana, rumana, E-o kaj la angla), kiu havis la saman signifon. 9 ne respondis, ĉiuj el la lernejo A.

- 55% kapablis identigi tiujn vortojn en aliaj lingvoj, kiuj similas la kongruajn E-vortojn, sed ree estis alta proporcio de nerispondantoj. La memjuĝo de la lernantoj de la lernejo B pri ĉi tiu kapablo estis 65%, tiu de la lernejo A nur 38%.

Kono de gramatiko

Nur 43% sukcese identigis adjektivojn en 4 vorto-paroj en 4 lingvoj (33% ne respondis).

Kono de Esperanto

Estis ĝenerala sukces-proporcio de 89% pri tradukado de vortoj el E-o al la angla, kaj 85% rilate al vorto-duoj; nur 63% estis la sukces-elcentaĵo pri formado de plurnombraj vortoj, sed pluraj miskomprenis la peton."

Estas evidente, ke ni estas ĉe la komenco de la evoluo de la prilingva kapablo aplikebla al la propra kaj al fremdaj lingvoj. La rezultoj ankoraŭ necertaj de la projekto *Springboard* verŝajne ŝuldiĝas al la tro mallonga instru-tempo (du duonaj horoj en ĉiu semajno) en kombino kun la pli juna aĝo de la infanoj kaj eble ankaŭ kun la strukturo de la gepatra angla lingvo, kiu certe ne helpas kompreni la klarajn kategoriojn de E-o pri substantivo, adjektivo, verbo kaj adverbo.

6. Konkludo

Ne vere estas io por konkludi, krom ke la intuicio de SZERDAHELYI ĝenerale montriĝas prava. Lernado de E-o helpas al lernado de dua lingvo. Tamen necesas multaj esploroj en tre rigoraj kondiĉoj por testi la kernan ideon de SZERDAHELYI: kiujn avantaĝojn E-o donas al la parolantoj de kiu lingvo, kiuj volas lerni kiun alian lingvon. La malmultegaj indikoj ĉi-kampe montras ke nova generacio de esplorantoj povus trovi tre interesajn rezultojn. Ĉu samgrade E-o helpas ĉinojn kaj germanojn lerni la anglan kaj anglojn lerni la ĉinan aŭ la germanan? Kiam temas pri la ĝenerala efiko de pliigo de la prilingva konscio pro lernado de E-o, ankaŭ tiukampe pliaj esploroj estas bezonataj ĉe infanoj de malsamaj lingvoj. Ĉu ankaŭ arabaj infanoj pro lernado de E-o akiras plian prilingvan kapablon pri la araba lingvo? Alivorte, se lingvo sekvas alian logikon rilate al E-o, kio okazas?

Eble ne hazarde la procentaĵo 71% de anglalingvaj infanoj, kiuj malkovris la pluralon en aliaj lingvoj estas tre pli alta ol tiuj 43%, kiuj povis malkovri adjektivojn. Ĉu tio dependas de la fakto, ke en la angla la pluralo estas klare markita per -s dum la adjektivo ne estas markita per io klare rekonebla? En E-o kaj la pluralo kaj la adjektivo havas klarajn markilojn, sed tio verŝajne efikas malsame depende de la ekzisto de markiloj en la unua lingvo.

Ni ne povas surbaze de la nunaj scioj respondi en defendebla maniero.

(fino)

Laŭregule aŭ ne: verboj kaj tempoj

de Radojica PETROVIĆ (Serbio)

En la evoluo de E-o, simile al aliaj vivantaj lingvoj, kelkfoje aperas tendencoj kiuj iras kontraŭ ĝiaj gramatikaj reguloj. Antaŭ nelonge en iu retgrupo estis diskuto pri uzado de la finaĵoj *-is* kaj *-as* por ago aŭ stato en estonteco en rilato kun alia ago aŭ stato. Jen reala komunika situacio, per kiu Hokan LUNDBERG lanĉis la diskuton enketante kelkajn interesatojn. La priskrbo estas iom adaptita por ĉi tiu artikolo.

Via filino estas skribanta hejman taskon, kaj vi invitas ŝin manĝi. Ŝi volas unue finfari la taskon kaj poste manĝi, do ŝia respondo povas esti:

- a) *Mi venos, kiam mi faris la taskon*, aŭ
- b) *Mi venos, kiam mi faros la taskon*, aŭ
- c) io tria.

Aŭ, la sama situacio el iom alia perspektivo. Vi vidas ke via filino skribas hejman taskon. Vi volas, ke ŝi finu la taskon kaj poste venu manĝi. Kion vi diros al ŝi?

- a) *Venu manĝi kiam vi faris la taskon*, aŭ
- b) *Venu manĝi kiam vi faros la taskon*, aŭ
- c) ion alian.

Ses enketitoj, inter kiuj tri infanoj – denaskaj esperantistoj, elektis la modelon *a*, tri la modelon *b*, kaj kelkaj proponis ion alian, ekzemple.

Mi venos kiam mi estos (fin)farinta la taskon.

Mi venos post kiam mi (fin)faros la taskon.

Unue mi finos la taskon kaj (tuj) poste venos.

La E-akademiano kaj psikolingvisto Renato CORSETTI esprimis komprenon, ke la infano prefere diras

Mi venos, post kiam mi (jam) finfaris tion.

ĉar la modelo

Mi venos, kiam mi finfaros tion.

malhelpas la infanon *stari en la estonteco kaj rigardi al la pasinteco*.

En nuntempaj retlistaj komunikaĵoj, venantaj kelkfoje eĉ de eminentaj E-pedagogoj, troveblas aliaj ekzemploj de la formo *-is* uzata por estonteco.

Ekzemple, diskutanto prezentas sian planon, petas la listanojn esprimi siajn ideojn kaj promesas:

Kiam ĉiu verŝis siajn ideojn, mi kunigos ĉiujn.

Aŭ, simile:

Mi atendos viajn komentojn pri la propono. Kiam la tuto ricevis vian aprobon, mi publikigos ĝin en nia retejo.

Ankaŭ –as aperas uzata por estonta ago, ekzemple:

Ni voĉdonos. Tiuj kiam iu propono havas kvar jesajn voĉojn, la rezulto povas esti deklarita.

Tio eblas kiam nova teamo estas elektita. Do ni atendu la elekton.

La E-akademiano kaj gramatikisto Bertilo WENNERGREN jene argumentis kontraŭ la uzado de –as kaj –is por estonteco:

Uzado de AS-formoj por estonteco estas kruda eraro en E-o. Eĉ pli kruda eraro, ja rekte perpleksige kruda, estas uzado de IS-formoj por estonteco. Kerna afero estas, ke AS, IS kaj OS estas verboformoj absolutaj en E-o. Iliaj tempaj valoroj rilatas al la nuno. Kontraste la participaj finaĵoj estas relativaj: Ili povas rilati al ajna arbitre elektita tempopunkto, indikante aŭ samtempecon, aŭ antaŭtempecon aŭ posttempecon rilate al tiu punkto.

Kelkaj ekzemploj el la *Fundamento* kaj klasika E-literaturo apogas tian rezonadon.

Ekzerco 17 de la Fundamento, la ekzemplo 12:

... kaj kiam malriĉa virino petos de vi trinki, vi donos gxin al ŝi ĝentile.

La evangelio laŭ Luko (<http://esp.scripturetext.com/luke/12.htm>)

Feliĉaj estas tiuj servistoj, kiujn la sinjoro, kiam li venos, trovos viglaj;

Fajrilo de Hans Christian Andersen

(rakontoj.googlepages.com/hca0006_eo.html , la 5-a alineo)

Kiam vi venos sur la fundon de la arbo, vi troviĝos en longa koridoro.

Konklude, en la cititaj ekzemploj el la retpoŝta komuniakdo devas esti -os anstataŭ la substrekitaj -is kaj -as. Por la ĉi-komence prezentita

komuniksituaĉio, regula estas la modelo *b*), sed la sama ideo povas esti esprimita aŭ pliprecizigita per aliaj rimedoj, ekzemple:

Mi venos farinte la taskon.

Mi finos la taskon kaj poste venos.

Mi venos kiam mi estos farinta la taskon.

Mi venos post kiam mi finfaros la taskon.

Erarologio 2

de **Rob MOERBEEK** (Nederlando)

Jam antaŭe mi komencis kombini trovitajn trooriginalaĵojn. Ne ĉiam kontentige. Vere, foje eraroj solveblas en pluraj manieroj. Eble la korektanto pretervidis kelkajn. Viaj rimarkigoj restas bonvenaj.

- 1) La kasisto ne akurate notis la spezojn de la asocio: li renversis la nulon kaj seson. Tio ne estas korekte.
- 2) Venis kelkiom kuriozaj francoj en mallongaj pantalonoj por furore plendi ke siaj kofroj mankis.
- 3) Ĉu vin plaĉis la anstataŭiga baledo por la originala musikalo?
- 4) Je nia entuziasmo ni legis pri la enketo de nia sensacia ensemblo Siksake: tiu rezultis en venkon de la bendo kiu superigis la orkeston de hoboo, klarineto, trompeto kaj violo ludinte akompanita de organisto.
- 5) Kiu ne tremblis je feliĉo aŭdante ke aliu ankau survivis la falon de la amerika benko?
- 6) Stakigi milion dominobriketojn kiu ne apogu sur unu alian estis tro riska por la prezidento de nia folologista klubo.
- 7) St. Nicolao alvenis kun la pakboato direkte el varma Hispanio, dum kiam la urbestro vestita kun lia kateno lin bonvenis.
- 8) Ĉu ni ne demandos al la politiko kulturi pli specoj da farmakologia herbo?
- 9) Al la hejtado de la atmosfero korespondas kresko da terurigaj malsanoj.
- 10) Kiam la reserĉisto rehavis la konsciencon li faconis lian kostumon, per spongo absorbante la makulojn.

- 1) Akurate = ĝustatempe. Estu: zorge, precize. Societo aŭ asocio. Renversi = faligi. Estu: inversigis. Seso = la nombro, ne la cifero: do "la nulon kaj

- la ses”. “Korekta krajono”: por korektado. La Akademio konsilas “ĝusta”, k.s. Kaj ĉi-kaze post “Tio” eblas nur –a.
- 2) Kelke da (kelkiom eblas, sed kontraŭas la principon de sufiĉo). Kurioza = stranga, oni ofte misuzas ĝin anst. scivola. Ĉi-kuntekste do eblas. Sufiĉas “en mallonga pantalono” (po unu). “Por” ne estas necesa post “venis”, tamen eblas se ni atentis la cirkonstancan adjekton “en mallonga pantalono”. “Siaj” ne eblas en la subjekto de la subpropozicio: iliaj. Kofro estas grandega, aŭ ŝargloko de aŭto. Normale oni havas valizojn. Ili ne diris: “Mankis al ni”, sed “mankas”. Same en la nereкта parolo. Furore: publikfavorate. Estu: furioze.
- 3) Ĉu plaĉis al vi (plaĉi ne estas transitiva). Oni anstataŭigis la muzikalon (kun z) per la baleto (kun t), kiu do estas anstataŭa (rolanta anstataŭ). Kaj la muzikalo origine (ne originale) troviĝis en la programo.
- 4) Ĉar ni uzu “je” plejeble malofte (laŭ Zamenhof), ni prefere diru: Kun entuziasmo. Tiuj vortoj kun EN ofte estas kurioze prononcataj france. Sed komparu la vorton ANkoraŭ: se sonu a ni ankaŭ skribas a. Rezulti =sekvi. Kun la sekvo, ke “sekvi en” havas malan signifon ol oni celas: el ĝi rezultis venko, aŭ: ĝi rezultigis venkon.
- Bendo similas rubandon; male bandito povas aparteni al bando, sed ĵazbando jam estas, malgraŭ la verva kaj danĝera bruado, por multaj tute akceptebla. Superigi iun = lasi la venkon al iu. Denove male al la intenco! Estu: superis. Eble ne nur la nederlanda (mal)malhavas kelkajn parolsonojn, kompare kun internaciaj vortoj: ‘palet’ anst. paletro, simile ‘orkest’ anst. orkestro. “De” estas tro uzata, ofte ni preferu “el” (konsistantan el). La instrumentoj estas: hobojo, klarneto, violono, orgeno. “Ludinte” rilatus la subjekton “ĝi = enketo”, ĉe orkestron ni epitetu “ludintan”. La akompanado okazis dumlude, do akompanate (ĝi rilatas la subjekton de “ludintan”: dum ĝi ludis akompanate).
- 5) “Trembli” estas tumondiĝanta anglismo. Pli simpla estas nia “tremis”. Eviti “je”, do “pro feliĉo”. “Aliuj” estas tia eblaĵo, kiu kontraŭas la sufiĉo-principon. Nur kelkfoje ĝi klarigas komplikan frazon. Ĉi tie sufiĉas aliaj, tamen kun antaŭa “ankaŭ”: “ankaŭ aliaj”. Survivi estas anglismo. Estu: supervivis aŭ transvivis. Benko estas meblo, sed oni provis traduki “the Bank of America”, do la “Banko de Ameriko” (Usono).
- 6) Oni stokas sed stakigas, do en ordo. Milionon da domen(tabulet)oj. “Apogi” estas transitiva: unu alian, aŭ apogiĝi unu sur alia. Ĉe infinitiva subjekto la predikativo havas la adverban finaĵon: estis riske (mi foje

klarigis: estis AGI riske). “Prezidentoj” laŭ PIV 2005 estu prefere ŝtatprezidantoj, sed malpli altrangaj estas de ĉiam prezidantoj. Tro ofte oni mikskombinas la profesiulan nomon kun la faknomo: aŭ filologo aŭ filologiisto, agronomo aŭ agronomiisto k.s.: filologa asocio (aŭ tamen “klubo” en urbego).

- 7) S-ta (Sankta) Nikolao (tro ofte oni “internaciigas” nomojn) alvenis per la pakaĵoŝipo rekte el H. La urbestro ne estis arestita, sed ornamita per sia ĉeno. “Bonveni” estas kunmetaĵo de la verbo veni. Do eble la urbestro mem bonvenis sur la kajo, sed li almenaŭ bonvenigis la episkopon.
- 8) Oni demandas por informiĝi, oni petas por havi servon. Ambaŭ verboj ĉe Zamenhof estas transitivaj rilate la personon alparolatan: Ĉu ni ne petu la politikistojn kultiv(ig)i pli da specoj de (speco ne estas kvanto) farmaciaj (pli tekniko ol scienco) herboj. Agrokulturo indikas, ke oni kulturas agron, teron, grundon, arbaron, sed kultivas fruktojn, legomojn.
- 9) La klimatsanĝo ampleksas kelkajn gradojn celsiajn, do varmigo estas pli ĝusta, malgraŭ la grandegaj konsekvencoj de la fenomeno. “Korespondi” estas intersanĝi leterojn. Pri fenomenoj estu: Al A respondas B.
- La malsanoj ne faras nin teruraj, sed ili mem teruras nin: teruraj (‘terurantaj’ ne necesas).
- 10) Reserĉi estas nur serĉi denove, laŭ PIV. Estu: detektivo, aŭ krimespioristo. Prefere: reakiris. Konscienco estas kapablo juĝi pri la (socia) pravigeblo de la propraj agoj. Li nur revenis al sciado pri la propra ekzistado: konscion. Ni metu komon post la subpropozicio. “Fasonis sian kompletan” (kostumo estas vesto por specifa okazo, ekz. folkloro aŭ ofica, sed detektivo ne fakidentiĝu). Se rolas du personoj, foje helpas jena konsilo: Ni uzu “sia” kiam eblas samsignife uzi “la”. Absorbi estas nur forkapti ies atenton, kaj la subjekto de sorbante estus la detektivo, kiu eble enbuŝigus la koton. Pli klare: per spongo sorbanta ...

Alvoko de la Sekretario

Ĉiuj, kiuj ŝanĝas siajn (ret)adresojn bonvolu sciigi pri tio la sekretarion de ILEI Małgosia KOMARNICKA (margareta.ilei.pollando@gmail.com). Samtempe ŝi petas, ke ĉiam komence de la jaro ĉiuj sekciestroj sendu liston de siaj membroj kun ĝustaj adresoj. Via kunlaboro plibonigos kaj plifaciligos sendadon de gravaj kaj foje urĝaj informoj. Anticipe ŝi dankas.

Instrui Esperanton en Indonezio

de **Heidi GOES** (Belgio)

En nia movado ni malofte aŭdas ion pri Indonezio, grandega insularo en sud-orienta Azio. Tamen antaŭ duona jardeko estis ankoraŭ forta movado tie. Jam de preskaŭ tri jaroj mi esploras pri la historio de la tiea movado (jam aperis artikoloj tiurilataj en *Esperanto en Azio* n-roj 60, 61 kaj 62), kaj mi intencis iri surloken por esplori kaj samokaze partopreni en la kvara *Azia Vegetarana Kongreso* en Batam, Indonezio – prepare al la partopreno de TEVA en la *Internacia Vegetarana Kongreso* en Ĝakarto en oktobro ĉi-jare – sed fine, instigite de KAEM, mi ankaŭ instruis E-on. Pri tiu instruado mi volas ĉi tie mallonge rakonti. Artikoloj en la revuo *Esperanto* (feb. 2010), *Esperanto en Azio* (nr. 67) kaj *Esperantista Vegetarano* (2010/1) traktas ankaŭ aliajn aspektojn de la vojaĝo. Prepare al la vojaĝo, mi kontaktis indonezianojn jam konatajn al mi kaj pere de ili aliajn homojn, sed mi ankaŭ uzis la socian reton *Facebook* kaj la



gastigan reton www.couchsurfing.com, ĉar la kontaktitaj universitatoj kaj internaciaj lernejoj tute ne reagis, do mi devis trovi alian manieron... Tiel post multe da retumado, mi povis fiksi lokojn kaj datojn por lecionoj en kvar urboj kaj ankaŭ jam certiĝi pri minimuma nombro da partoprenantoj. Sed la surlokaj cirkonstancoj ofte estis surprizaj: en Batam tute neatendite (nur kun iomete da varbado ĉe mia gastiganto) mi povis instrui po horon al tri grupoj da lernejoj kaj iliaj instruistoj, kaj en mia lasta tago tie mi estis invitita instrui en plia loko, kaj aliloke foje estis multe malpli aŭ multe pli da homoj ol atendite...

Rilate al la surloka ekipaĵo mi devis foje tuj adaptiĝi... en unu el la bazlernejoj mi eksciis, ke mi havos neniun teknikaĵon je mia dispono, sed mi ankaŭ povis instrui tie nur mallonge, kaj tio ne estis problemo. Sed en Yogyakarta, kie estis bela klaso kun granda ekrano kaj projekciilo, mi devis kelkfoje rapide komenci alian ekzercon, pro tio ke la elektro forfalis kaj revenis plurfoje dum la kvarhora kurso. Tre ofte homoj ne povis resti dum la tuta kurso (se ĝi daŭris pli ol horon) aŭ alvenis pli malfrue, kaj se temis pri pluraj personoj, kiuj alvenis post du horoj (mi ja ne volis rifuzi ilin...) necesis foje almenaŭ la alfabeton ripeti, por ke ili povu iom sekvi la ceteron. Tre ofte, kiam mi instruis en la sama loko pli ol horon, la kunorganizanto donacis al la lernantoj manĝetojn, foje abunde, foje tre simple; preskaŭ ĉie mi estis akceptita tre varmkore kaj invitita reveni. La rektoro de la multekosta universitato Widayatama en Bandung ĉeestis parton de mia kurso kaj sciigis ke se estus iu instruisto havebla surloke, li organizus daŭran kurson tie.

Fine mi sukcesis instrui E-on dum kvardek kvar horoj, en 6 diversaj urboj



(Batam, Yogyakarta, Semarang, Bandung, Ĝakarto kaj Bogor) kaj tio en diversaj lokoj: du bazlernejoj, du mezlernejoj, du altlernejoj, tri universitatoj kaj unu muzeo kaj aldone tri-foje hejme ĉe gastigantoj aŭ amikoj, kaj unu fojon por grupo da lernantoj de hejma instruistino, kiu mem estis sekvinta la kurson la antaŭan tagon. Entute partoprenis preskaŭ 500 infanoj, studentoj kaj plenkreskuloj. Mi

disdonis pli ol cent ekzemplerojn de la E-ŝlosilo por indonezianoj (*Kunci Esperanto*), kiun UEA sukcesis eldoni ĵus antaŭ mia vojaĝo, kaj preskaŭ cent *Poŝamikojn* por ebligi al la lernantoj mem studi. Ne eblis donaci tiujn libretojn al ĉiuj, sed eĉ tiuj, kiuj partoprenis nur unu aŭ du horojn, ricevis materialojn por plustudi, kiel ekz. kopion de la gramatika parto de la ŝlosilo, vortoliston de indoneziaj vortoj kiuj similas al sia Esperanta ekvivalento kaj liston de interesaj retligiloj por pluinformiĝi pri E-o. (En Semarang, Bandung kaj Ĝakarto aperis paperaj kaj retaj gazetartikoloj pri la kursoj kaj/aŭ pri E-o ĝenerale, kun mencio pri la kursoj. Ligiloj al tiuj artikoloj aperas en la Ipernity-blogo de *edukado.net*, kie legiĝas ankaŭ pli detala raporto pri la vojaĝo.) Mi planas denove viziti Indonezion okaze de la *Internacia Vegetarana Kongreso* en Ĝakarto, de la unua ĝis la sesa de oktobro 2010. Dum tiu kongreso TEVA plej verŝajne havos budon kun informoj pri E-o, kaj donus bonan impreson se ĉe ĝi deĵorus apud indoneziaj komencantoj ankaŭ eksterlandaj esperantistoj. Antaŭ, dum kaj post la kongreso mi volas organizi ne nur kursojn, sed ankaŭ, se eble, ekzamenojn. Por ĉio ĉi estas bonvenaj pliaj spertaj esperantistoj, kaj pli bone eĉ instruistoj kaj rajtigitaj ekzamenantoj. Se vi pensas iri tien, aŭ alimaniere povus helpi, bonvolu kontakti min:

Blogo de edukado.net pri mia vojaĝo:

<http://www.ipernity.com/blog/edukado.net/201669>

Facebook-grupo por indoneziaj esperantistoj:

<http://www.facebook.com/group.php?gid=205294336248>

Adresoj: rete: <heidi.goes@gmail.com>; letere: *Assebroeklaan 2, BE-8310 Brugge, Belgio*; telefone: +32 50 675178.

Raporto pri instrua vojaĝo al Ĉinio

de **Ronald GLOSSOP** (Usono)

Dum aŭgusto 2009 kvar urboj en Ĉinio gastigis la usonan emeritan profesoron Ronald GLOSSOP, direktoro de *Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo* por helpi instrui E-on, aparte al infanoj. Dum la vizito, Profesoro Ron instruis en elementa lernejo en Taiyuan, en mezlernejo kaj publikaj parkoj en Wuhan, en infanĝardeno en Nanĉang kaj en universitato en Harbin.

La ĉefa ilo de instruado, kiun li uzis, estas la *Kanto de la Koloroj* (ankaŭ konata kiel "Ruĝa Pomo"), kiu uzas la konatan francan melodion *Frato Ĵako*. Vi povas vidi ĉiujn 13 strofojn de tiu kanto ĉe: www.icxlm.org. Post la lernado de la kanto, la lernantoj konversaciis per demandoj kiel "Laŭ la kanto, kio estas flava?" kaj "Kia [kiukolora] estas forko?" kaj "Kio estas jupo?" La lernantoj ankaŭ lernis kaj interparolis pri numeraloj ĝis mil kaj pri la legado de horloĝoj.



La ĉinaj esperantistoj prizorgis ĉion por la kvar-semajna vizito de Profesoro Ron. La tutan aferon planis wuhanano, s-ro PENG Zhengming (Trigo). FAN Xiani, universitata studentino, profesoro LI Weilun, s-ro WEI Shan, kaj s-ro WEN Jingen akompanis lin en trajno de Pekino al Taiyuan. En Taiyuan la lernejestro WEI Yubin aranĝis la unu-semajnan viziton. Profesoro LI el Pekino, kiu verkis la lernolibron kiun oni uzas en tiu lernejo, helpis profesoron Ron instrui la lernantojn kaj ankaŭ la instruistojn kaj kelkajn gepatrojn.

Poste en Wuhan, FAN Ziyong kaj LI Guorong (Gloro), la gepatroj de Xiani, gastigis lin. Dum unu semajno Xiani gvidis Profesoron Ron al diversaj lernejoj kaj publikaj parkoj kie XIONG Zhouxuan (Vera)

aranĝis ŝancojn instrui lernantojn kaj propagandi al ne-esperantistoj. S-ino RAO Jian (Sanoza) akompanis profesoron GLOSSOP de Wuhan al Nanĉang, kie ŝi kaj la edzo XU Bin gastigis lin kaj veturigis lin je tri tagoj al privata infanĝardeno por instrui E-on al la infanoj. Li ankaŭ renkontis aliajn esperantistojn en Nanĉang, inkluzive de CAO Xionglin (Pinaro), prezidanto de la loka klubo. Poste li veturis per trajno al Ŝanhajo kie geamikoj s-ino ZHANG Miaojuan kaj s-ro ZHAO Yifeng renkontis lin kaj akompanis lin de la stacidomo al la flughaveno por lia flugo al Harbin.

En Harbin profesorino SONG Ping (Paco) ĉe Heilongjiang-Instituto pri Scienco kaj Tekniko, direktis ĉion. Ŝi renkontis lin ĉe la flughaveno, veturigis lin al la hotelo kiun ŝi aranĝis, ĉiutage veturigis lin inter la hotelo kaj la universitato, provizis per ĉiuj manĝoj kaj aranĝis ĉion por lia posta vojaĝo per trajno al Pekino. Dum kvin tagoj Profesoro Ron instruis la anglan matene kaj E-on posttagmeze ĉe la universitato.



En Pekino ne-esperantista profesoro ZHANG Shengjun, direktoro, Fakoj de Politiko kaj Internaciaj Studoj ĉe Bejinga Normala

Universitato, invitis profesoron Glossop prelegi anglalingve pri "*The Evolution of Responsible National Sovereignty*" ("La Evoluo de Respondeca Nacia Suvereneco"). Dum kvar tagoj en Pekino, profesoro Glossop havis ŝancon renkonti WEI Shan kaj profesoron LI Weilun kaj ankaŭ renkonti multajn aliajn pekinajn esperantistojn inkluzive de d-ro ZHENG Bocheng, ĝeneral-sekretario de Pekina E-Asocio YE Nianxian (prof. Freŝa Maro), prezidanto de la Pekina E-Asocio NAN Youli, estrarano de tiu asocio WANG Yanjing, kaj s-ino WANG Lu, kiu ofte partoprenas en UK-oj.

El la landoj kaj sekcioj...

Bulgario

Gvidlibro de la amikeco

Ekde la 22-a ĝis la 29-a de novembro 2009 okazis la unua laborrenkontiĝo enkadre de projekto „Gvidlibro de la amikeco” en la urbo P. Trambesh, Bulgario. Gastoj en lernejo „Canko Cerkovski” kaj en la urbo Polski Trambesh estis gelernantoj kaj geinstruistoj el Francio, Pollando kaj Hungario. La lingvo de interkomunikado estis E-o. Pere de ĝi, la junaj homoj de ĉiuj partneraj landoj kaj iliaj gvidantoj transpasis la lingvajn barilojn, kiuj ofte ekzistas antaŭ la partoprenantoj en similaj okazaĵoj.



Antaŭ la urba muzeo



Geinstruistoj de la projekto (dekstre la hotelestro)

La bazaj temoj kaj problemoj de la partnereco estas: edukado por la eŭropaj landoj kaj por la lernantoj plialtigo de la atingoj, kiuj estas necesaj en la ŝanĝiganta Eŭropo.

La temo de la unua laborrenkontiĝo, okazigita en la lernejo “Canko Cerkovski”, Bulgario, estis “Multvizaĝa Eŭropo”.

Ĉiu lernejo ellaboris multmedan prezentadon laŭ la temo – “La lando de miaj geamikoj”. La lernejo de Bulgario prezentis Francion, la lernejo de Francio prezentis Pollandon, la lernejo de Pollando – Hungarion, kaj la hungara lernejo – Bulgarion.

La prezentadojn ni montris antaŭ ĉiuj partoprenantoj en la projekto kaj ankaŭ antaŭ multaj geinstruistoj kaj gelernantoj, kiuj kun granda intereso partoprenis en la laboragadoj.

Ĉiu partnero havis ankaŭ la eblon prezenti sian propran landon. Dum la gastigitaj geinstruistoj renkontiĝis kun la instruistaro de la lernejo “Canko Cerkovski”, la gelernantoj ellaboris afiŝojn kun informoj pri siaj lernejoj, urboj kaj landoj. Poste ĉiuj afiŝoj estis metitaj sur videblan lokon en la lernejo. Vespere ĉiuj partoprenantaj lernejoj prezentis sian landon kantante kaj dancante – vestitaj en siaj belaj popolaj kostumoj.

Inter la gelernantoj de la 4 partneraj lernejoj okazis komputila -matematika konkurado, konkuradoj pri futbalo, basketbalo kaj volanteniso. La gastoj havis la eblon viziti lernohorajn pri muziko kaj sporto. Ni ĉiuj vidis, ke

inter la gelernantoj kaj la geinstruistoj tute ne estas diversecoj, des pli ke ni havis komunan pontolingvon – Esperanto. Ni kune vizitis ankaŭ la sidejon de folkloro grupo “Poljanci” kaj tie ĉiuj gastoj havis eblon lerni kelkajn belajn bulgarajn popoldancojn kaj iuj eĉ ekdancis dum la ripetado. Dum la vespero ni ĉiuj ĝuis la belegan koncerton de la junaj popolaj kantistoj kaj dancistoj de “Poljanci”. Ĉiuj partoprenantoj renkontiĝis kun la urbestro kaj membroj de la urba konsilantaro, kiuj ricevis multajn demandojn de la gastoj. La respondoj estis tre detalaj. Ankaŭ tiu ĉi renkontiĝo okazis en E-o kaj kiam necesis traduko, faris ĝin s-ino Mariana GENĈEVA.

Dum la renkontiĝo naskiĝis la ideo por peresperanta ĝemeligo inter Polski Trambesh kaj iu el la urboj – partneroj en la projekto. Ni vidos kiel kreskos tiu ĉi ideo. La gastoj havis eblon viziti Veliko Tarnovo, Pleven kaj Etara. Ili ekamis multajn el la belegaj lokoj en Bulgario kaj ekdeziris iam denove reveni ĉi tien. La venonta laborrenkontiĝo okazos dum majo 2010 en la urbo Lyon, Francio. La temo estas “Eŭropo – pasinteco, estanteco kaj estonteco”.



Dum preparo de ekspozicio

Estos daŭrigataj la amikaj kunligoj kiuj naskiĝis ĉi tie kaj certe ekos novaj. Por pli konata, pli bona kaj pli amikema Unuiĝinta Eŭropo!

Mariana GENĈEVA, <maries972@yahoo.com>

Ĉinio

La 8-a Ĉina Kongreso de E-o. Kiam E-o "infaniĝas"

Dum la 3-5-a de decembro 2009 okazis en la bela kaj historia ĉina urbo Nankino (ĉina ĉefurbo de la kulturo), ĉe ĝia plej fama universitato, la 8-a Ĉina Kongreso de E-o, kun partopreno de ĉirkaŭ 400 esperantistoj de la tuta lando, krom kelkaj el aliaj landoj (Francio, Usono, Japanio, Tajvano, Hispanio, Irano).

La programo estis interesa, kun allogaj prelegoj kaj prezentadoj. Ĉefe plaĉis al la ĉeestantoj la vasta uzo de E-o, ne nur surkoridore, sed ankaŭ dum la prelegoj kaj oficialaj programeroj, tute malsame de la antaŭa kongreso, antaŭ du jaroj en Kantono, kie praktike ĉio okazis en la ĉina lingvo, kvankam la partoprenantoj bone regis nian internacian lingvon. S-ro Wang, el Shanghai, publike, sur la podio, petis, ke ekde nun ĉio okazu en E-o. Longa aplaŭdo sekvis lian proponon.

Se mi devus ion elekti, la plej interesa kaj alloga parto de la kongreso estis la partopreno de esperantistaj infanoj. Du infanaj grupoj aktive kaj vigle partoprenis. La infanoj de ambaŭ grupoj bele kaj kuraĝe parolis kaj kantis en nia lingvo. La ĉeestantoj iĝis ege kortuŝitaj.

Unu el tiuj grupoj venis de la urbo Zhenjiang, de la provinco Jiangshu, de la lernejo Baotalu, kies instruistino estas Neĝeta (Shi Xueqin), kiu instruas tie E-on al la geinfanoj kune kun sia edzo, Michel FONTAINE, franco. Ili estas bone konataj kaj eĉ ricevis belan memordiplomon de Ĉina E-Ligo, pro sia granda helpo al la disvastigo de E-o en Ĉinio.

Ĉiuj ne nur ĝuis la prezentadojn de la infanoj, sed povis babiladi kun ili. Ili estas ĉarmegaj, kuraĝaj, diligentaj. Dum la dua tago de la kongreso Neĝeta kaj Michel faris kun ili provlecionon, antaŭ la publiko, kiu estis agrable surprizita. En nia E-mondo troviĝas multaj teoriistoj de la instruado de E-o. Sed ni ĉiuj devus lerni de la instrumentadoj de Neĝeta kaj Michel. Vere ili estas talentaj instruistoj, allogaj, kiuj facile komuniĝas kun la gelernantoj, kiuj, krom lerni bone, evidente amas tiujn admirindajn instruistojn. Ekde tiu tago mi, malnova instruisto, decidis ke mi devas ŝanĝi miajn instru-metodojn, kaj iomete "kopii" de ili. Dum tiu leciono okazis ankaŭ reta babilado kun la brazila esperantistino Karesema, ege simpatia, kaj kiu

ankaŭ bonege komunikiĝis kun la infanaro. Ĉio ĉarmega. Bona etoso, feliĉaj infanoj, feliĉaj observantoj.

Pro tio mi antaŭe, en alia artikolo, diris ke "Esperanto en Ĉinio plijuniĝas". Nun mi devus diri ke "Esperanto en Ĉinio infaniĝas". Kun tiaj geinstruistoj, kun tiaj gelernantoj, kun kuraĝaj homoj kiel s-ro Wang (kaj multaj aliaj) mi antaŭvidas brilan estontecon (eble jam estantecon) de la ĉina E-movado.



Sur la foto aperas la geinfanoj, Michel, Neĝeta kaj mi mem, kun la E-flago de la E-asocio de Foshan.

Augusto CASQUERO

Pollando

1) La pola sekcio de ILEI informas ke ĝia sola oficiala retpaĝo estas: www.ilei.pl. Nur pri ties enhavo respondecas la sekcio. Se iu havas demandojn aŭ interesiĝojn pri agado de la sekcio, bonvolu kontaktiĝi kun la estraranoj: Piotr Nosek (pyotreq@gmail.com), Małgosia Komarnicka (v.p.2) aŭ Magdalena Tataro (mtataro@gmail.com).

2) **La 150-a naskiĝdatreveno de la kreinto de la internacia lingvo** estas bona okazo por memorigi aŭ sciigi al la homaro pri la ekzisto de E-o kaj ĝia movado, sed antaŭ ĉio pri la granda homo, Ludoviko Zamenhof.

La 19-an de novembro 2009 krakovaj kaj aliaj polaj esperantistoj organizis malgrandan renkontiĝon, kiu celis popularigon de E-o inter neesperantistoj. La aranĝo okazis en la sidejo de Asocio de Pola-Franca Amikeco en Krakovo, kaj estis ligita kun la tradicia gustumado de la juna vino *Beaujolais nouveau*. La renkontiĝon kunorganizis Asocio de Pola-Franca Amikeco kaj ILEI-PL kunlabore kun Robert KAMIŃSKI, estrarano de Pola E-Asocio kaj prezidanto de la filio de PEA en Lodzo.

Ĉe vino kaj bongustaĵoj, la publiko havis eblon aŭskulti du mallongajn prezentadojn. La unua – farita de Robert KAMIŃSKI – temis pri la vivo de Ludoviko Zamenhof, historio kaj aktualeco de la E-movado kaj avantaĝoj de la kono de E-o. La duan prelegon prezentis Lidia LIGEŖZA – poetino, tradukistino kaj prezidantino de *Krakova Societo Esperanto*. Ŝi parolis pri PIV, kiu estas signifa kontribuo de francoj al la evoluigo de E-o, kaj pri esperantigado de pola poezio. Fine ŝi prezentis en E-o kelkajn polajn versaĵojn. La partoprenantoj povis ankaŭ preni flugfoliojn preparitajn en la pola kaj franca lingvoj kaj informiĝi pri la lingvo kaj movado. Estis kelkaj personoj, kiuj vere ekinteresiĝis pri la ideo de E-o kaj lernado de la lingvo.

Magdalena TATARA

Informoj pri ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Mireille Grosjean (prezidanto), Mónika Molnár (vicprez.), Reza Torabi (sekretario), Karine Arakelian, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu

Elekta: Tiekio Isikawa, Ana Montesinos de Gomis, Aurora Bute (gvid.)

Kontrolo: Ulla Luin, Simon Smits, Rudi Koot

Lerneja: Carola Antskog (gvid.), Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Julián Hernández (estrare), Tiekio Isikawa, Marija Jerković, Luigia Madella, Jacqueline Poux, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi

Regulara: Marija Beloŝeвиč, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas (Estrare: Stefan MacGill)

Terminara: Maŭro La Torre (gvid.), Miroslav Malovec, Ilona Koutny (Estrare: Radojica Petrovič)

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Aida Čižikaitė, Renato Corsetti, Ilona Koutny, Radojica Petrovič, Kristin Tytgat

Kunlaborantaj institucioj

EEU: *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, cantskog@kolumbus.fi

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, info@ikso.net. Tel: +421 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj.

Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74. NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: redaktanto@edukado.net.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6, 0049-55215983, Trejnsejnoj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, zsolia.korody@esperanto.de

FIPLV (Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj): Repr. de ILEI: **Stefan MacGill**

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Gregor Hinker**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.uea.org. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Stefan MacGill**. A-komitatano el ILEI: **Atilio Orellana Rojas**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Claude Nourmont**.

UNESKO (en neformalaj rilatoj): Reprezentantoj de ILEI: **François Lo Jacomo**, 72, quai de la Loire, FR-75019 Paris, francois.lojacomo@wanadoo.fr; **Monique Arnaud**, Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@aliceadsl.fr; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60;

Membreco kaj pagado por aliaj servoj

Membreco kostas 18 EUR en A-landoj (laŭ UEA-difino) **kaj 9 EUR en B-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 8 EUR por la A-landoj kaj 4 EUR por la B-landoj.** Bonvenaj estas donacoj al la fondaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por Juna amiko. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas membrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por Juna amiko akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al Julija BATRAKOVA, p/a Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, [<persiko@mail.ru>](mailto:persiko@mail.ru).

La pagoj povas okazi pere de la nederlanda ILEI-konto, al la ILEI-konto ĉe UEA aŭ al la sveda konto:

* Pagoj al la nederlanda konto de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bv. aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo).

* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldono de sumo por bankokostoj. Indiku viajn nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko), pike-b (projekto Interkulturo).

* Pagoj al la sveda bankkonto: El Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Swedbank.

El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT-kodo SWEDSESS.

Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankokostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.

* Simpla abono de IPR sen membreco: 18 EUR. Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Hejmpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Iwona KOCIEBA, Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem. **Presado**: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, tel.: (+32-3)-234 34 00. **Redaktejo**: NÉMETH József, HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5, [<jozefo.nemeth@gmail.com>](mailto:jozefo.nemeth@gmail.com), <http://www.ilei.info/ipr/>; tel.: (+36-89) 356-050. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk, [<r.moerbeek@wanadoo.nl>](mailto:r.moerbeek@wanadoo.nl).

La nunan numeron ni sendis al la presejo 25 januaro 2010, redaktofino por la sekva numero 15 aprilo 2010.



Kurso de Heidi GOES en Indonezio (vd p.31)



SEKCIOJ

Albanio: Vasil Pistoli,
c/o Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Muco,
Pall. 50, ap. 3, AL-Tirana,
selimibardhyl@yahoo.com

Aŭstralio: Jennifer Bishop, 39
Hill St, AU-3122 Hawthorn VIC,
esperanto@education.monash.edu.au

Belgio: Iwona Kocięba,
Graaf de Fiennesln 54, BE-2650
Edegem, iwona.kocieba@telenet.be

Benino: François Hounsounou,
BP 226, BJ-Lokossa-Mono,
hounfranc@yahoo.fr

Brazilo: vakas
geinstruistoj@ileibr.org

Burundio: Jérémie Sabiyumva,
BP 170, Rumonge, Burundio,
jerrybs21@yahoo.fr

Britio: Angela Tellier,
10 Marina Gardens, Felixstowe,
Suffolk, IP11 2HW (GB)
angela@esperantoeducation.co.uk

Ĉeĥio: Jana Melichárková,
CZ-696 02 Ratiškovice 938,
melicharkova@quick.cz

Ĉinio: Gong Xiaofeng, School of
Environmental and Chemical
Engineering, Nanchang University,
CN-330031 Nanchang,
arko.gong@qq.com

Danio: Bent Jensenius Højstrupvej
124, DK-2700 Brønshøj,
bentjensenius@gmail.com

Finnlando: Carola Antskog,
Brokärsvägen 89, FI-25700 Kimito
cantskog@kolumbus.fi

Francio: Michel Dechy,
65 allée de la Crémaillère,
FR-59650 Villeneuve d'Ascq,
michel_dechy@hotmail.com

Germanio: Zsófia Kóródy,
E-Centro, Grubenhagenstr. 6,
DE-37412 Herzberg/Harz,
zsofia.korody@esperanto.de

Hungario: József Németh,
Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász,
jozefo.nemeth@gmail.com

Irano: Hamzeh Šafii, P.O. Kesto
17765-184, IR-Teheran,
hamzeh@esperanto.org

Italio: Luigia Oberrauch Madella,
via Prampolini 8, IT-43100 Parma,
silkovojo@aliceposta.it

Japanio: Isikawa Tieko,
103, Tate 1-6-6, Siki, Saitama
JP-353-0006,
isksanjo@ff.e-mansion.com

Katalunio: Pedro M. Martin
Bututxaga, Arnau Gatell 2-4-2,
ES-17300 Blanes,
ileicat@hotmail.com

Korea Resp.: LEE Jung-kee,
Seula E-Kulturcentro. 601 ho,
Dongbuk B/D 2-ga Choongmuro
Chungku Seulo, KR-100-860,
esperanto@saluton.net

Kroatio/KEL: Marija Jerković,
Jarunska 6, HR-10000 Zagreb,
mjerkovic@net.hr

Kroatio/KEU: Ivan Bekavac-
Basić, Kušlanova 59, HR-10000
Zagreb, ilei@hes-keu.hr

Kubo: Marta Alonso Gutiérrez,
Malecón 659 entre Belascoain y
Gervasio; CU-10200 Ciudad de La
Habana, kubesp@enet.cu

Nederlando: Atilio Orellana
Rojas, Postbus 10600
NL-2501 HP Den Haag,
atilioorellanarojas@gmail.com

Norvegio: Anne-Karin Bondhus,
Morenefarefaret 8A, NO-4340 Bryne,
akbondhus@jkn.no

Pollando: Piotr Nosek,
ul. Zbrojów 10/8, PL-30 042
Kraków, estraro@ilei.pl

Rumanio: Mihai Trifoi,
Str. Principală, Bl.1 Ap.3,
RO-527116 Bixad/Jud. Covasna,
mihaitrifoi@yahoo.com

Rusio: Irina Gončarova,
Molodeznaja 38-10, Odincovo 2,
Mosk. obl. RU-143000,
mirina@online.ru

Svedio: Agneta Emanuelsson,
Carl Ugglas väg 6, SE-641 37
Katrineholm,
agi.emanuelsson@telia.com

Svislando: Mirelle Grosjean,
Grand-rue 9. Pf. 9,
CH-2416 Les Brenets,
mirejo.mireille@gmail.com

Togolando: Attiogbe-Agbemadon
B., Mensah, T.I.E.To, B.P. 13169,
Lomé, esp.togo@cafe.tg

Ukrainio: Volodimir Hordijenko,
str. Ivana Kudri 38/ 18, UA-01133
Kijiv, volodomir@ukr.net

Usono kaj Kanado: Ronald
Glossop, 8894 Berkay Avenue,
Jennings MO 63136-5004 (US),
rglossop@mindspring.com

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldo-
vakan 26/2, kv.52, AM-375062
Erevan, LIDELB@freenet.am

Barato/Hindujo: Venkatesh
Reddy, No. 216, Off Main Road,
Whitefield, Bangalore 66,
Karnataka, esperovr@yahoo.co.in

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta
Kulenović, Branica Sarajeva 15/V,
BA-71000 Sarajevo

Ĉilio: Héctor Campos Grez,
Casilla 903, CL-3340000,
hecg@uea.org

Estonio: Helgi Hromova,
Pk. 623, EE-12602 Tallinn

Islando: Loftur Melberg
Sigurjónsson, Traðarberg 13,
IS-221 Hafnarfjörður,
loftur@skyrr.is

Israelo: Gian Piero Savio,
13/4 Menora-str. IL-53490
Givatajim, saviogp@zahav.net.il

Kongo DR: Ngangu Nduantoni-
Bakidila,
B.P.13, CD-Lukala, Bas-Zaïre

Kostariko: Hugo Mora
Poltronieri, Apartado 4981,
CR-1000 San José,
tikoguau@gmail.com

Litovio: Algimantas Piliponis,
Kavoliuko 3-93, LT-04325 Vilnius,
piliponis@centras.lt

Meksiko: José de Jesús Corrales
C., Belice 116, Fraccionamiento
Guadalupe, Durango, Dgo.
jdjcorrales@yahoo.com.mx

Nov-Zelando: Gwenda Sutton,
12C Herbert Gardens,
186 The Terrace,
NZ-6001 Wellington 1,
gwenda.s@ihug.co.nz

Serbio: Radojica Petrović,
Bul. oslobođenja 36,
RS-32000 Čačak,
radojica.petrovic.rs@gmail.com

Uzbekistano: Eugeno S.
Perevertajlo, Abon. jashik 140,
Počtamt, UZ-700000 Taškento, CIS,
esperuzo@mail.ru